

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

44a jarkolekto, marto 2023/03

Revivigi indiĝenajn lingvojn en Venezuelo

Teruraĵo kontraŭ Abe Shinzo
malfermis la skatolon de Pandoro

Pliiĝis la kultivado de opio
en Afganio

Olaf Scholz kaj Wirecard:
la forgesema kanceliero



FOTO DE LA KOVRILLO: PHOTO SPIRIT / SHUTTERSTOCK.COM

En tiu ĉi numero

	el diplomatia vidpunkto	
	D. R. KONGO	3
	➤ Kurboriĉa vojo al demokratio	
	politiko	
	ĈILIO/BOLIVIO/PERUO	5
	➤ Teritoriaj disputoj foriĝis. Kaj nun?	
	IRLANDO	7
	➤ Ĉu demografia ŝanĝo kondukos al unuiĝo?	
	moderna vivo	
	JAPANIO	8
	➤ Teruraĵo kontraŭ Abe Shinzo malfermis la skatolon de Pandoro	
	AFGANIO	11
	➤ Pliiĝis la kultivado de opio	
	lingvo	
	VENEZUELO	12
	➤ Revivigi indiĝenajn lingvojn	
	ekonomio	
	GERMANIO	13
	➤ Olaf Scholz kaj Wirecard: la forgesema kanceliero	
	filozofio	
	KULTURO	16
	➤ Materia kaj spirita ento	
	literaturo	
	RAKONTO	18
	➤ Maks, Lora kaj Roland	
	historio	
	ESEO	20
	➤ Naturismo kaj Esperanto: komuneco de destino	
	arto	
	PENTRARTO	23
	➤ Pentristo de la nigro	
	MUZIKO	25
	➤ Milito kaj arto	
	libroj	
	➤ Pupteatro beletra, unuvoĉa	27
	➤ Por ekzameniĝi sen problemoj	29
	➤ Tragedia rakonto	30

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 44a jar-kolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.

MONATO havas 159 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 64 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
(Flandra Esperanto-Ligo),
Lange Beeldekenstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio;
telefono: + 32 3 234 34 00;
retpoŝto: eldonejo@monato.be;
Skype: fel-monato;
BE0419 028 122 -
RPR Antwerpen.

abontarifo:

La abontarifo varias laŭlande.
Vd. en MONATO 2022/11, p. 32
kaj en monato.be/tarifo.php
aŭ petu ĝin de
eldonejo@monato.be.

retejo: www.monato.be



sociaj retejoj:

Twitter: @RevuoMonato
 Facebook: facebook.com/revuo.Monato/
 Telegram: monato.telegram.org
 Youtube: www.monato.be/jutubo
 Mastodon: @monato
@esperanto.masto.host
 Instagram: RevuoMonato

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paŭl Peeraerts.

reviziantoj:

Edmund Grimley Evans,
Jens S. Larsen, Rob Moerbeek,
Brian Moon, Fransoazo Noireau,
Manolo Parra, Andrej Peĉenkin,
Anna kaj Mati Pentus, Remuŝ,
Antônio W. de Ruijter.

faktokontrolanto:

André Ruyschaert

redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.be.

grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip

redaktoroj:

➤ **Arto:** Aleksej Salomatov,
Moskvo, arto@monato.be.
➤ **Ekonomio:** Roland Rotsaert,
Belgio, ekonomio@monato.be.
➤ **Eseoj:** Sendu al la koncerna
redaktoro, depende de la temo.
➤ **Historio:** Trevor Steele,
Aŭstralio, historio@monato.be.
➤ **Hobio:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, hobio@monato.be.
➤ **Komputado:** Edmund
Grimley Evans, Britio,
komputado@monato.be.
➤ **Leteroj:** Paŭl Peeraerts,
Belgio, leteroj@monato.be.
➤ **Libroj:** libroj@monato.be.

Noto: Librocenzorojn oni ne
sendu al la redaktoro propra-
iniciate. La kunlaborantoj
ricevos la recenzopetojn kaj la
librojn de la eldonejo.

➤ **Lingvo:** Roberto Pigro,
Kipro, lingvo@monato.be.
➤ **Literaturo:** Trevor Steele,
Aŭstralio, literaturo@monato.be.
➤ **Medio:** medio@monato.be.

➤ **Moderna vivo:** Norberto
Díaz Guevara, Kubo,
moderna_vivo@monato.be.

➤ **Politiko:** Massimo Ripani,
Italio, politiko@monato.be.

➤ **Scienco:** Roberto Pigro,
Kipro, scienco@monato.be.

➤ **Spirita vivo:** Alberto García
Fumero, Kubo,
spirita_vivo@monato.be.

➤ **Turismo:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, turismo@monato.be.

D. R. KONGO

Kurboriĉa vojo al demokratio



Julius HAUSER

Jam dum kelkaj jardekoj la mondaj amaskomunikiloj raportas pri armita konflikto, perforto, granda krimado, etnaj konfliktoj kaj humaneca krizo en Demokratia Respubliko Kongo (DRK). En novembro ili dissendis ankaŭ mallongan informon, ke kenjaj soldatoj – parto de la orient-afrikaj regionaj fortoj¹ batalantaj kontraŭ la ribeluloj – alvenis en la urbo Goma, kiu situas en la orienta parto de DRK. Kio okazas en la laŭ areo due plej granda lando de Afriko? Kiel la lando povas troviĝi en tiom malbona situacio? La respondon indas serĉi en ĝia historia kaj politika evoluo.



MATTIAATH / SHUTTERSTOCK.COM

Historio

Se diri simple kaj koncize, en la lando okazas enlanda milito, bataloj inter la registaraj fortoj kaj rivalaj armitaj grupoj. DRK havis turbulan historion, ĝiaj unuopaj reĝimoj estis kreitaj kiel konkreta rezulto de internaj klanaj kaj etnaj konfliktoj. En la pasinteco ĝi ekzistis kiel la Reĝlando Kongo, Libera Ŝtato Kongo, Belga Kongo, Kongo



Laŭ taksadoj de fakuloj, en la lando agadas pli ol 120 armitaj grupoj, kiuj masakras kaj murdas la civilan loĝantaron, ofte en etna purigado

Kinŝasa, Zairo. La sendependecon ĝi akiris en 1960 kaj ekde tiu jaro membras en Unuiĝintaj Nacioj (UN).

La politikan malstabilecon de la lando tre forte influas ankaŭ la ruanda genocido en 1994 kontraŭ tucioj kaj parte ankaŭ kontraŭ hutuoj, kiu rezultigis la unuan kongan militon. La posta streĉiteco inter la tiama prezidanto kaj la ruandaj soldatoj ĉeestantaj en la lando kondukis al la dua konga milito en 1998–2003, en kiu ankaŭ aliaj afrikaj landoj partoprenis. Kvankam la dua konga milito oficiale finiĝis per pactraktatoj, armita kaj etne motivita konflikto daŭre ekzistas.

1. La kreadon de orient-afrikaj regionaj fortoj interkonsentis en junio 2022 en Najrobio la gvidantoj de la sep membroŝtatoj (Burundo, Demokratia Respubliko Kongo, Kenjo, Ruando, Sud-Sudano, Tanzanio kaj Ugando) de la Orient-Afrika Komunumo. Ĉi-lastas estas interregistara organizaĵo fondita en 1967 kaj revivigita en 2001 post kolapso en 1977. La sidejo estas en la urbo Arusha (Tanzanio).

Armitaj grupoj

La ĉefaj agantoj de la enlanda konflikto en DRK estas nuntempe diversaj fragmentaj ribelgrupoj. En la orienta parto de la lando, malgraŭ la pactraktatoj, jam dum jaroj batalado inter la registaraj trupoj kaj ribeluloj daŭras. Laŭ taksadoj de fakuloj, en la lando agadas pli ol 120 armitaj grupoj, kiuj masakras kaj murdas la civilan loĝantaron, ofte en etna purigado.

M23

Unu el la ĉefaj armitaj grupoj estas la „Movado de la 23a de marto” (M23), kiu konsistas plejparte el membroj de la tucia etno. Ili forlasis la registaran armeon, asertante, ke la registaro ne sufiĉe agas por protekti la rajtojn de tiu etna malplimulto, al kio ĝi devontigis sin kontrakte en pactraktato de 2009. M23 gvidis ribelon en la nordoriento de DRK inter 2012 kaj 2013, sed ĝi estis venkita de registaraj trupoj. Ĝiaj membroj estis kelkajn jarojn armee neaktivaj. Tamen, fine de 2021, ili rekomencis batali kontraŭ la kongaj registaraj trupoj, akuzante la registaron pri neplenumo de la interkonsentoj. Ekde tiam ili konkeris kaj akiris grandajn areojn en la provinco Nord-Kivu, inkluzive de

la malgranda, sed strategie ŝlosila, urbo Bunagana ĉe la limo kun Ugando.

Reciproka kulpigo

Laŭ diplomatoj kaj milit-analizistoj, la militaj agadoj de M23 malstabiligis rilatojn ne nur en DRK, sed ankaŭ en Mez-Afriko. DRK akuzas la najbaran Ruandon pri subteno al la ribeluloj. Ruando rifuzas la kulpigon kaj kontraŭe asertas, ke DRK kunlaboras kun ribela grupo „Demokrataj fortoj por la liberigo de Ruando”, kiu partoprenis la genocidon de la tucioj. Se diri diplomatie kaj simple, sakstrato.

Sensukcesa UN-misio

Por solvi armitajn konfliktojn per pacaj kaj diplomatiaj rimedoj, la Sekureca Konsilio de UN per siaj rezolucioj 1279 (1999) kaj 1291 (2000) kreis pacmision sub la nomo MONUSCO². La pacmisio de UN en DRK estas la plej granda tiaspeca kaj celas pacigi la multnombrajn armitajn grupojn, kiuj batalas unu kontraŭ la alia kaj kontraŭ la registaro en ĉi tiu granda kaj ercoriĉa lando.

Agadoj de internacia komunumo

La ĝisnunaj deklaroj de mondaj politikistoj kaj in-

ternaciaj organizaĵoj postulas sindetenon kaj dialogon. Ekzemple UN, Eŭropa Unio kaj Eŭropa Parlamento adoptis rezoluciojn pri la politika situacio en DRK, kiuj kondamnis la perforton kaj alvokis al dialogo de ĉiuj flankoj. Bedaŭrinde, sen sukceso.

Malgraŭ la enormaj diplomatiaj klopodoj de la internacia komunumo, daŭre okazas diversaj fizikaj perfortaj agoj kaj nenecesaj mortoj, ne nur ĉe la loka civila loĝantaro sed ankaŭ ĉe la soldatoj de pacfortoj de UN. Februare 2021 en la oriento de la lando eĉ mortis itala diplomato, Luca Attanasio, kiu funkciis kiel eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro en DRK.

Trista paradokso

Unu el la ĉefaj kialoj de la nuna malfavora situacio en DRK estas ankaŭ historia rivalo inter etnoj, ĉefe inter tucioj kaj hutuoj. Dum en la 1960aj jaroj la enlanda konflikto estis kondukata kiel batalo kontraŭ imperiismo aŭ por socialismaj reformoj, aktualaj disputoj inter etnoj okazas ĉefe pro ekonomiaj kialoj: akiri superregadon en regiono kun naturriĉaĵo. Profitoj el lokaj oro, kobalto aŭ koltano fluas ne por la prospero de la regiono kaj la

lando, sed por la financado de daŭraj armitaj konfliktoj.

Neantaŭvidebla estonteco

La plua politika kaj ekonomia evoluo de DRK estas do nuntempe malfacile antaŭvidebla. Ankaŭ la klopodoj de la internacia komunumo solvi la enlandan konflikton per pacaj rimedoj ĝis nun ne estis efikaj. Ŝajnas, ke la fina diplomatia solvo de la enlanda politika situacio en DRK ne povas esti venko por iu ajn el la etnoj kaj armitaj grupoj. Eble ĉi tiun internan afrikan problemon solvos novaj politikaj gvidantoj, kiuj ne estos ŝarĝitaj de la kolonia pasinteco, kaj kies prioritato estos nur demokratio kaj ekonomia kresko de la lando favore al la loĝantaro. ■



Julius HAUSER
estas emerita
ambasadoro
de Slovakio.

2. MONUSCO: Stabiliga Misio de Unuiĝintaj Nacioj en Demokratia Respubliko Kongo, akronimo de la franca nomo *Mission de l'Organisation des Nations Unies pour la stabilisation en République démocratique du Congo*. Ĝis 2010 ĉi tiu misio estis konata ankaŭ kiel MONUC.



(Re)legu ankaŭ la artikolon de Arlain Kizeyidioko-Mayinda *Malkonsento voje al baloto*, MONATO 2022/04, p. 10.

ĈILIO/BOLIVIO/PERUO

Teritoriaj disputoj foriĝis. Kaj nun?



Leonardo ARAYA

korespondanto de MONATO en Ĉilio

En la „pacifika milito” (1879–1884) Ĉilio invadis kaj aneksis la regionojn Tarapacá kaj Antofagasta, kiuj apartenis respektive al Peruo kaj al Bolivio, kaj tiel ricevis gravajn strategiajn poziciojn en la dezerto Atacama.



MATTHIAS BACHMAIER / SHUTTERSTOCK.COM

Ekde la „pacifika milito” (1879–1884), kiu finiĝis per venko de Ĉilio super Peruo kaj Bolivio, la rilatoj inter la tri najbaraj landoj estas polemikaj kaj malsimplaj. La konflikto okazis pro ekonomiaj intereso kaj malkonsento pri impostado rilate al la ekspluatado de salpetro, kupro kaj aliaj mineraloj en la dezerto Atacama.

En tiu milito, Ĉilio invadis kaj aneksis la regionojn

Tarapacá kaj Antofagasta, kiuj apartenis respektive al Peruo kaj al Bolivio, kaj tiel ricevis gravajn strategiajn poziciojn en la dezerto Atacama. Peruo perdis grandajn minojn de salpetro kaj kupro, kaj Bolivio perdis la samon kune kun sia marbordo.

Kiam la milito finiĝis, traktadoj komenciĝis inter la tri landoj por longdaŭra paco en la regiono. Ĉilio konservis aneksitajn regionojn, sed redonis la oku-

”

Eĉ se ekde la pacifika milito militaj konfliktoj en la regiono ne plu okazis, multaj politikaj kaj diplomaciaj disputoj, kiujn registaroj diskutis antaŭ internacia kortumo

pitan provincon Tacna al Peruo en 1929 kaj konsentis ne fordoni la provincon Arica al alia lando sen perua konsento. Fine la landlimoj inter la landoj estis difinitaj.

Internacia Kortumo

Eĉ se ekde la pacifika milito militaj konfliktoj en la regiono ne plu okazis, multaj politikaj kaj diplomaciaj disputoj, kiujn registaroj diskutis antaŭ internacia kortumo.

En 2014 la Internacia Kortumo en Hago verdiktis kontraŭ Ĉilio rilate al mara teritorio grava por la perua ekonomio. En marto de la sama jaro la du landoj aprobis la koordinatojn de la mara landlimo.

La posta kortuma decido estis celebrata en Ĉilio kiel nacia venko. Tiam Bolivio petis teritorion argumentante, ke post la milito la najbaro konsentis trakti pri la cedo de aliro al maro. Ĉilio asertis, ke tiu fakto okazis en 1946, do antaŭ la fondo de la Internacia Kortumo, kiu pro tio ne rajtas okupiĝi pri la temo. En 2018 la juĝinstanco decidis, ke Ĉilio ne havas devon trakti pri la cedo de aliro al maro.

La rivero Silalo

Inter la du landoj restis ankoraŭ nefermita temo, pri kiu denove decidis kortumo. Ĉi-foje la objekto de la kverelo estis la statuso de la rivero Silala, kiu fluas trans la landlimon inter Ĉilio kaj Bolivio. La unua asertis, ke la rivero estas natura, do la du landoj rajtas uzi ĝin kiel internacian riveron, sed Bolivio argumentis, ke Silala fluas tra Ĉilio per artefaritaj kanaloj, do Ĉilio devas pagi al Bolivio pro ĝia uzo.

Feliĉe por Ĉilio, la 1an de decembro 2022 la Internacia Kortumo en Hago decidis, ke Silala estas internacia rivero, do Ĉilio ne devas pagi al la najbaro. La decido estis grava plejparte

por la Fervojo de Antofagasta al Bolivio (FCAB) kaj la Nacia Korporacio de Kupro de Ĉilio (CODELCO), kiuj nun uzas la akvon de la rivero.

Solvi konfliktojn pace

La konduto de la tri landoj montras, ke oni povas solvi konfliktojn en paco. Perforto neniam estas solvo por niaj problemoj.

Due, la landoj ĉiam devas trakti kaj paroli, diplomatio estas la nura vojo por atingi stabilecon inter popoloj kaj eviti militon. Ni volas labori por unuiĝo, sed por projekti estontecon kiel regiono, ni devas rigardi nian estintecon kaj sanigi militajn vundojn tiom, kiom ni povas.

Neteritoriaj disputoj

Nun la estonteco restas tamen nebula, ĉar novaj polemikoj pri grandaj migradaj fluoj estas nova kaŭzo de malkonsento. Ekzemple, iuj ĉiliaj politikistoj proponas plifortigi la polican apudeston ĉelime kun Peruo kaj Bolivio por malpliigi ne-regulan migradon, kaj ksenofobiaj esprimoj iĝis hodiaŭ pli kutimaj ol antaŭe.

Muroj plialtiĝas

Ĉilio trairas malfacilan momenton, kaj, bedaŭrinde, ofte ŝajnas, ke la muroj inter latin-amerikaj landoj plialtiĝas ĉiutage. La solvo de niaj landlimaj konfliktoj igas, ke ni povu esperi por paco kaj komprenemo inter




Estas bedaŭrinde, ke landoj, kiuj parolas saman lingvon kaj havas similan kulturon, ne povas kompreni unu la alian

ni, sed la konfliktoj, la militoj, kaj speciale ekonomiaj kaj politikaj krizoj en landoj kiel Venezuelo, Bolivio kaj Peruo, aŭ popolismaj movadoj, kiuj bezonas instigi naciajn sentojn, komplikas la vojon al paco kaj progreso.

Estas bedaŭrinde, ke landoj, kiuj parolas saman lingvon kaj havas similan kulturon, ne povas kompreni unu la alian. ■



Leonardo ARAYA
estas studento
pri sociologio.



Spektu la filmetojn
pri MONATO en
www.monato.be/jutubo

IRLANDO

Ĉu demografia ŝanĝo kondukos al unuiĝo?



Garbhan MacAoidh

korespondanto de MONATO en Irlando



LUKASSEK / SHUTTERSTOCK.COM

Kiam Irlando sendependiĝis en 1922 la plimulto de la loĝantoj de ses el la graflandoj (distriktoj) de la norda provinco Ulstero estis protestantoj, kiuj deziris resti kiel integra parto de Britio. Armitaj protestantaj volontuloj ribelis, dum la katolikaj naciistoj reagis per formado de la armita „Irlanda Respublikana Armeo” (IRA): la tuta insulo iĝis disigita kaj ofte malpaca. Popolnombrado de 2021 montris tamen drastan transformon, kiu eble influos la estontecon.

Katolika plimulto

Unuafoje en la historio evidentiĝis katolika plimulto ankaŭ en Nord-Irlando, kiu ne plu estas „protestanta hejmo por protestantoj”. Aldone kreskas la nombro de tiuj, kiuj priskribas sin „nek protestanto, nek katoliko”.

Ne simpla afero

Super artikolo en lastatempa ĵurnalo estas la titolo: „Demografia marŝo al reunuiĝo”. La irlandaj naciistoj opinias, ke la demografiaj ŝanĝoj neeviteble kondukos al unuiĝita Irlando. La afero tamen ne es-

tas tiom simpla, ĉar multaj „novaj irlandanoj” (la asimilitaj enmigrintoj) estas nek de brita nek de denaska irlanda deveno, do ne taksas politikon aŭ etnecon la plej gravaj elementoj en sia vivo. Krome, religio ne plu ludas historian rolon, nek en la antaŭe fervore protestanta nordo, nek en la antaŭe preskaŭ tute katolika sudo.

Antaŭjuĝoj

Bedaŭrindas, ke en ambaŭ partoj de la „verda insulo” sufiĉe multaj homoj suspektas kaj malfavore antaŭjuĝas siajn najbarojn. Kelkaj sudanoj diras, ke ili

ne ŝatus loĝi apud nordanoj, kaj sama sinteno estas kons-
tatebla en Nord-Irlando, kie kelkaj Uniistoj (porbritaj protestantoj) asertas, ke ili translokiĝus al Britio prefere ol vivi sub regado de la respubliko. ■



Garbhan MacAoidh estas plurlingva tradukisto kaj verkisto, kiu kontribuas al MONATO ekde 1988.



QUALITY STOCK ARTS / SHUTTERSTOCK.COM

Teruraĵo kontraŭ Abe Shinzo malfermis la skatolon de Pandoro


HATACHI Toshiko

korespondanto de MONATO en Japanio

La 8an de julio 2022 Abe Shinzo, la eks-ĉefministro de Japanio, estis pafita kaj mortigita surstrate dum sia parolado por subteni la lokan kandidaton en Nara. La suspektato Yamagami Tetsuya (41-jara) diris, ke li planis murdi Abe por venĝi sin kontraŭ la religia grupo Eklezio de Unuiĝo (*EdU*)¹.

1. Eklezio de Unuiĝo estiĝis en Koreio kaj havas plurajn koneksajn organizaĵojn. La nomo ŝanĝiĝis en 1994. Ĝi estas konsiderata problema sekto pro cerbolavado, deva geedziĝo, postulado de tro grandaj mondonacoj ktp.

Laŭ li, lian familion tute detruis tiu religia institucio.

Yamagami diris, ke en la komenco li planis murdi Han Hak-ja (nuntempa prezidanto de *EdU*, la edzino de la fondinto Moon) tamen la kovimo-pandemio malhelpis tion. Tial li ŝanĝis la celon al Abe.

Post la teruraĵo ekestis la suspekto, ke ĉi tiu religia grupo estas profunde ligita al la japana politiko. Japanio deklaras „laikecon” en sia konstitucio, t.e. la ŝtato devas ne kunligi sin kun iu ajn religia grupo, ĉar la konstitucio estas verkita por ne ripetigi la politikon aplikatan dum



La 8an de julio 2022 Abe Shinzo, la eks-ĉefministro de Japanio, estis pafita kaj mortigita surstrate

la dua mondmilito, kiam Japanio instigis homojn al la milito utiligante religian kuntekston de ŝintoo. Tamen, reale pluraj religiaj grupoj estas en ligo kun la parlamento kaj havas klaran influon en la politiko. Estas konate, ke Abe kaj lia familio estas firme ligitaj kun *EdU* ekde la tempo de lia avo.

En Japanio estas kontraŭeco inter konstitucio kaj praktiko, kion oni jam scias, sed ne volas tuŝi. Kial rilatas eksterlanda religia grupo al la japana politiko? Kial li murdis la eksministron pro persona venĝo kontraŭ la religia grupo?

La historio de „politiko kaj religio”

Ĉiam kaj ĉie ajn potenculoj utiligas religion por mastri popolon. En Japanio tio okazas de antikva epoko.

La japana regnestro Tennoo originis el la japana indiĝena religio ŝintoo, kiun karakterizas animismo kaj politeismo. Ŝintoo havas nenium biblion, sed la historiaj libroj „Kojiki” kaj „Nihon Ŝoki” ekvivalentas ĝin. Verkitaj en la 700aj jaroj la libroj prezentas, kiel Japanio fondiĝis. La priskriboj en ili estas preskaŭ fantazioj, tial oni ne povas scii la precizan tempon, kiam Tennoo ekaperis. Estas certigite, ke almenaŭ en la 4a jarcento p.K. Tennoo ekzistis. Laŭ la libroj, la familio Tennoo estas la idoj de la plej alta dio. Tiaj priskriboj legitimas la regnestrecon de Tennoo, kunligante la religian miton al la politika potenco. Fakte, dum la tuta historio Tennoo apenaŭ havis realan politikan potencon, kiun ja havis nobeloj aŭ generaloj. Malgraŭ tio, la familio Tennoo ne malaperis kaj plu tenis sian prestiĝon. Meze de la 19a jarcento Tennoo regajnis realan potencon unuafoje post pluraj jarcentoj. Oni konstruis rapidege la fortan burokratisman ŝtaton, kiun kronis Tennoo.

La ŝtato kaj ŝintoo tiom firme kunligiĝis pere de Tennoo, ke la ŝtato nomis sin „la lando de la dio”. La kompleksaĵo de ŝtato kaj

”

Pluraj religiaj grupoj estas en ligo kun la parlamento kaj havas klaran influon en la politiko

”

La ŝtato kaj ŝintoo tiom firme kunligiĝis pere de Tennoo, ke la ŝtato nomis sin „la lando de la dio”

”

La hodiaŭa situacio de Japanio ne kongruas kun la principo de laikeco, kiun preskribas la konstitucio

”

Kiam la tria Abe-kabineto stariĝis, 19 el la entute 20 ministroj apartenis al Ŝintoa Politiko-Ligo

religio havis tro fortan potencon kontraŭ la popolo. Tio ŝrumpigis demokrati- on dum la dua mondmilito. Porpacaj aktivuloj kaj politikaj kontraŭuloj estis arestitaj kaj akre turmentataj, kaj multaj estis murditaj. Pro tio la Supera Komando de la Aliancaj Armeoj (SKAA) fiksas la laikecon en la nova konstitucio post la milita malvenko de Japanio. Ĝi celas, ke la registaro neniam plu atencu la liberecon je pensado kaj religia kredo de ĉiu individuo. SKAA lasis Tennoo plu vivi kiel „simbolo de la ŝtato”, sed lasis al li nenian politikan povon.

Ĉu laikeco nuntempe?

Tamen la hodiaŭa situacio de Japanio ne kongruas kun la principo de laikeco, kiun preskribas la konstitucio. La aktuala registaro de Japanio konsistas el du koaliciaj partioj, la Liberal-Demokrata Partio (LDP) kaj la Komei-partio (KP), kiuj havas rilaton al religioj.

LDP, kiu estis la reganta partio en Japanio dum preskaŭ la tuta tempo ekde 1955, havas rilaton kun pluraj konservemaj religiaj grupoj. Precipe kiam la tria kabineto Abe (2015-2017) stariĝis, 19 el la entute 20 ministroj apartenis al Ŝintoa Politiko-Ligo, kiu estas konata pro sia ekstreme konservema principo „faru Japanion kiel antaŭ la dua mondmilito”. Laŭ ili, la nuntempa konstitucio estas „trudita de SKAA”, kaj

Japanio devas regajni sian propran konstitucion sur la bazo de ŝintoo.

Aliflanke, KP estas establita kaj subtenata de Soka Gakkai, la plej granda enlanda budhisma sekto, fondita en 1930. Ĉiuj membroj de KP estas ankaŭ membroj de Soka Gakkai. La partnereco inter LDP kaj KP impresis strange, ĉar iliaj subtenantoj havas tute malsamajn filozofiojn. Aparte, dum la dua mondmilito Soka Gakkai estis severe subpremata de la registaro pro tio, ke ĝi rifuzis kulti ŝintoon kontraŭ postulo de la registaro. Rezulte ĝia fondinto estis arestita kaj mortis en malliberejo. Pro tiaj historiaj eventoj la plejparto de Soka Gakkai evitas ŝintoajn sanktejojn.

Estas malfacile kompreni kiamaniere ilia koalicio eblas. Tio igas nin rememori ĉinan proverbon: „malamikoj sur la sama boato”.

Familio detruita de la religio

EdU estas, aliflanke, iom diferenca de la supre menciitaj religiaj grupoj, ĉar ĝi estas fondita en Koreio. Ĝin fondis Moon Sun-myung en 1954, kiel frakcion de kristanismo. Koncerne ĉi tiun religian grupon oni raportas en Japanio pri multaj problemoj. Interalie raportigas, ke ĝi submetas studentojn al cerbolavado kaj apartigas ilin de iliaj familioj, postulas de kredantoj eksterordinare grandajn

mondonacojn kaj pelas ilin al bankroto, kaj la kredantoj devas geedziĝi kun homoj elektitaj de la gvidanto.

La patrino de Yamagami Tetsuya, la suspektato pri la murdo de Abe, estas fervora membro de *EdU*. Laŭ intervjuoj kun parenco lia, la familio travivis tro krue-lan tempon. En la infanaĝo de Yamagami lia patro sin mortigis, kaj lian plejaĝan fraton kaptis kancero. En la klopodo por savi lin la patrino aliĝis al *EdU*, kiu tuj absorbis ŝin. La patrino mondonacis al la organizo pli ol 100 milionojn da enoj (ĉ. 700 000 eŭrojn), kvankam ŝiaj gefiloj apenaŭ povis manĝi. Yamagami atingis tre bonan poentaron en la lernejo kaj poste matrikuliĝis en altnivela universitato. Tamen li kontraŭvole devis rezigni la universitaton pro tio, ke li ne plu povas pagi la kotizon. Li provis mortigi sin, kiam li estis 25-jara. Laŭ lia parenco, li emis al tio kun la celo disponigi al siaj gefratoj la monon de la vivasekuro. Dek jarojn poste, kiam Yamagami estis ĉirkaŭ 35-jara, lia plejaĝa frato iris al la hejmo de estrarano de *EdU*, portante tranĉilon. Li tie mortigis sin.

Abe kaj Eklezio de Unuiĝo

En Japanio estas konata la fakto, ke Abe havis amikajn rilatojn kun *EdU*. Abe naskiĝis en familio, kie formiĝis multaj politikistoj. Lia avo Kishi Nobusuke,

kiu ankaŭ estis ĉefministro, amikiĝis kun la fondinto Moon. Ili simpatiis kontraŭkomunismen. Antaŭ la naskiĝo de Abe, lia familio kaj *EdU* havis rilatojn. Fakte, en februaro 2022, okaze de la festo de organizaĵo ligita kun *EdU*, Abe sendis filmon kun gratulmesaĝo, kie li esprimis sian admiron pri Han Hak-ja. Yamagami diris, ke ĉi tiu filmeto decidigis lin murdi Aben.

La amikeco inter Abe kaj *EdU* donis al japanoj strangan senton, ĉar iliaj dogmoj estas tute kontraŭaj. Abe estas konata kiel fervora patrioto kaj reprezentanto de la ekstrem-dekstraj politikistoj. Dum sia mandato li plurfoje vizitis la sanktejon Yasukuni, kie estas sanktigitaj la instigintoj de la milito. Liaj vizitoj al la sanktejo kaŭzis fortan riproĉon enlande kaj eksterlande, tamen li ne interrompis sian vizitadon. Tial li gajnis grandan popularecon inter dekstremuloj kaj aziofobemuloj. Aliflanke, Moon Sun-myung asertis, ke Tenuo kaj la japanoj devas cedi kaj servi al Koreio. Tio devas esti tute ne akceptebla precipe de patriotoj, eĉ se ili havas la komunan celon kontraŭbatali komunismen kaj individuismen.

Ĉu daŭros la rilatoj kun *EdU*?

Post la teruraĵo kontraŭ Abe malkovriĝis la fakto, ke ne nur Abe, sed ankaŭ multe pli da politikistoj ol

eblis imagi, rilatas al *EdU*. Surprize, laŭ enketo 179 el la 379 parlamentanoj de LDP havas rilaton kun la religia grupo en diversaj manieroj. Ne malmultaj eĉ partoprenis ĝian kunvenon kaj ricevis monoferon. Ne nur anoj de LDP sed ankaŭ kelkdek anoj de la opoziciaj partioj rilatis al ĝi. Kelkaj pardonpetis, sed multaj aliaj neis la aferon aŭ tute silentis. Iu estrarano de LDP eĉ diris „Mi ne komprenas, kial rilato inter LDP kaj *EdU* estas problemo”. Japanaj politikistoj vartis sian intiman rilaton kun *EdU*, kvankam multaj seriozaj problemoj de *EdU* estis delonge bone konataj en Japanio. Oni suspektas, ke tiuj politikistoj ricevis helpon de *EdU* por elektiĝi, kaj ke *EdU* povis influi la politikon pere de la politikistoj. Ĵurnalistoj kaj parlamentanoj daŭre esploras la problemon, sed LDP ŝajne evitas alfronti ĝin.

Post la duafoja elekto de Abe en 2012, li realigis multajn leĝojn kaj gajnis popularecon, fortigante sian karakteron ignori kontraŭulojn. Konsekvence, Abe restis en sia ĉefministra posteno dum la plej longa tempo en la japana historio. Dum lia periodo gravaj problemoj pri demokratio sin

sekviz: suspekto de koluzioj kun intimaj entreprenoj, falsado kaj perdiĝo de oficialaj dokumentoj, leĝigado de leĝproponoj, kiuj povas atenci civilajn rajtojn, ktp. Li estadis kiel „la simbolo de la tempo” kaj por sekvantoj kaj por kontraŭuloj.

Post lia morto ni trovis, ke tia maniero ignori la bazajn principojn de demokratio ŝajne radikigiĝis en Japanio; lian ŝtatan funebraĵon decidis nur la kabineto, malgraŭ ke pli ol duono de la popolo kontraŭis tion.

Dum la tempo pasas, multiĝas la viktimoj de *EdU*. Ĉu Japanio povas fortranĉi la rilaton kun *EdU*? Ni nun alfrontas malfacilajn kernajn problemojn pri religioj, politiko kaj demokratio en Japanio. ■



HATACHI Toshiko estas japana sociala laboristo kaj licencita publika psikologo. Ekde 2015 ŝi estas direktoro de ne-profitcela organizaĵo por senhejmaj virinoj kaj infanoj.



(Re)legu ankaŭ la artikolon de SRADDHĀPA „Amiko de Tajvano”, **Monato** 2022/10, p. 9.

AFGANIO

Pliiĝis la kultivado de opio



Evgeni **GEORGIEV**
korespondanto de MONATO en Aŭstrio

La rikolto de opio en Afganio en 2022 estis la plej profitdona de kelkaj jaroj. La kultivado pligrandiĝis je preskaŭ unu triono, kaj la prezoj kreskis sendepende de tio, ke la lando estas skuata de humanitara kaj ekonomia krizoj. Tio prezentiĝis en raporto (la unua, post kiam la taliboj atingis la regpovon en aŭgusto 2021) de la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Narkotaĵoj kaj Krimado (OUNNK).

La internacia komunumo devas labori por kovri la urĝajn bezonojn de la afgana popolo kaj plifortigi la necesajn paŝojn por haltigi la krimgrupojn, kiuj komercas per heroino kaj damaĝas la homojn en la tuta mondo.

Laŭ konstatoj de OUNNK la kultivado de opio en Afganio pliiĝis je 32 % en

2022 kompare kun la pasinta jaro, kaj ĝi atingis 233 000 hektarojn. La areo de opio en 2022 estis la tria laŭ amplekso ekde la komenco de monitorado. La kultivado estas koncentrita en la sud-okcidentaj partoj de la lando, kiuj havas 73 % de la kultivata areo, kaj en kiuj estas observata plej forta pligrandiĝo de la rikolto. Ekzemple, en la provinco Helmand unu kvinonon de la kultivata tero okupas opio-papavo.

La rikolto de opio en 2022 povus esti uzata por la produktado de 350-380 tunoj da heroino kun eksporta kvalito kaj pureco de 50-70 %.

Prezoj grave plialtiĝis

Post la anonco de la malpermeso de kultivado en aprilo de 2022 la prezoj de opio konsiderinde pli-



Oni provizas per afganaj opioidoj ĉirkaŭ 80 % de la konsumantoj en la mondo

altiĝis. La enspezoj ricevitaj de la kamparanoj por la vendo de opio kreskis pli ol trioble: de 425 milionoj da usonaj dolaroj (ĉ. 400 milionoj da eŭroj) en 2021 ĝis 1,4 miliardoj da usonaj dolaroj (ĉ. 1,3 miliardoj da eŭroj) en 2022. Tiu cifero egalas al 29 % de la valoro de la agrokultura sektoro en 2021. Dum 2021 la va-

loro de la opioidoj¹ egalas la valoron de ĉirkaŭ 9 % de la agrokulturaj produktaĵoj de la antaŭa jaro.

La pliigo de la enspezoj ne nepre transformiĝas en aĉetpovon, ĉar en la sama periodo la inflacio akre plialtiĝis, kaj la prezoj de la nutraĵoj averaĝe kreskis je 35 %.

La okazaĵoj lige kun konfiskado – prezentitaj de la Platformo pri Monitorado de Drogoj de OUNNK – montras, ke la trafiko de opioidoj daŭras sen interrompo ekde aŭgusto 2021. Oni provizas per afganaj opioidoj ĉirkaŭ 80 % de la konsumantoj en la mondo. ■

1. Opioido estas psikoaktiva substanco funkcia en rilato kun opioido-riceviloj, kiuj troviĝas ĉefe en la centra kaj periferia nerva kaj gastro-intesta sistemoj.

VENEZUELO

Revivigi indiĝenajn lingvojn

PHOTO SPIRIT / SHUTTERSTOCK.COM

Jezer **DORANTE**

korespondanto de MONATO en Venezuelo

Multaj indiĝenaj lingvoj de Venezuelo estas minacataj aŭ sin trovas en grava danĝero de formorto. La du lingvaj familioj kun la plej granda nombro da idiomoj kaj da parolantoj estas aktuale la araŭaka kaj la kariba. Laŭ donitaĵoj haveblaj danke al la lasta indiĝena censo (okazinta en 1992) kaj la ĝenerala censo de loĝantaro kaj loĝejoj de 2001, minimume 70 indiĝenaj lingvoj estas parolataj en Venezuelo.

La familio araŭaka inkluzivas la jenajn lingvojn: *Anu* (kun nekonata nombro da parolantoj), *Kuripako* (2019), *Loko-*

no (140), *Ŭarekena* (199), *Ŭajuu* (119 000). *Ŭajuu* estas la indiĝena lingvo plej atestata en Venezuelo, ĉefe en la okcidenta regiono (en la subŝtato Zulia kaj en la kolombia departemento La Guajira). La familio kariba inkluzivas la jenajn lingvojn: *Akaŭajo* (644 parolantoj laŭ la lasta nombro), *Karino* (4450), *Pemo* (30 000), *Jekŭana* (5200) kaj *Jukpa* (3285).

Inter la aliaj familioj estas la sekvaj.

- Ĉibĉa: Bari (1520).
- Guaibo: Jivi (8492), Kuiva (310).
- Sáliba-Piaroa: Sáliba (17), Piaroa (12 000).
- Tupí: Jeral (482).
- Janomami: Sanumá (1669), Janomami (6119).

Sindevigo

Tiuj lingvoj estis iam nekonataj kaj nekompreneblaj por la cetera venezuela popolo, sed inter la 17a kaj la 20a jarcentoj pluraj homoj malkovris kaj klopodis kompreni ilin, ilian strukturon, ilian gramatikon, eĉ ilian fonetikon, por krei dulingvaj vortarojn kaj pli bone kompreni la lokajn minoritatajn popolojn. Kvankam ili estas en diversaj regionoj de Venezuelo, la plej granda nombro da indiĝenoj loĝas en la subŝtatoj Zulia, Delta Amacuro kaj Amazonas. Tie la plimulto de ili ankoraŭ konservas la proprajn kulturon, lingvon kaj kutimojn.

Antaŭ nelonge la nacia instituto pri indiĝenaj lingvoj kreis apartan komisionon

por revigligi indiĝenajn lingvojn. En la okcidenta regiono de Venezuelo, en la subŝtato Zulia, estas kreita konsilio, kies celo estas antaŭenigi, disvastigi kaj revigligi la indiĝenajn lingvojn de la areoj. Dum reta kunveno reprezentantoj de la urboj, kie loĝas indiĝenaj popoloj en la regiono (Ŭajuu, Anú, Jukpa, Barí kaj Japreria), sin devigis defendi kaj protekti siajn gepatrajn lingvojn. Ĉi tiu iniciato estas subtenata de la landa prezidento Nicolás Maduro. Ĉi tiu registara subteno faciligos la institucian laboron en la diversaj teritorioj, kie loĝas familioj de praa origino. La ĉefa celo de tiu komisiono estas eviti la malaperon de tiuj minoritataj idiomoj kaj tiamaniere plifortigi lokajn kulturojn. ■

GERMANIO

Olaf Scholz kaj *Wirecard*: la forgesema kanceliero

Martin PTASINSKI
Germanio

Ĝis nun ne tute klaras la rolo de la nuna federacia kanceliero Olaf Scholz en la tuta skandalo.



MIDARY / SHUTTERSTOCK.COM

Junio 2020. La mondo suferas dum la unua pandemia somero. La pandemio kondukas al tutmonda ekonomia krizo, firmaoj bankrotas. Inter ili ankaŭ la bavara fincnserva entrepreno *Wirecard*. Ties bankroto unuavide ŝajnis esti unu el la bedaŭrindaj sekvoj de la pandemia-ekonomia krizo, sed tre baldaŭ evidentiĝis, ke la kialoj por

la bankroto estas tute aliaj: ĝian nesolventecon kaŭzis malrespondeca financa konduto, grandskala fraŭdo, kaj neklarigebla manko de 1,9 miliardoj da eŭroj.

Plia suspektinda fakto estas, ke la iama ĉefa entreprena oficisto (ĈEO) de *Wirecard*, Jan Marsalek, tuj post anonco de ties nesolventeco subite malaperis kaj kun li miliardoj da eŭroj de investintoj. Tia estis la

”

En 2015 la brita *Financial Times* (FT) unufoje raportis tre kritike pri la ekonomia konduto de *Wirecard*

komenco de la plej granda, kaj ĝis nun ne solvita, ekonomipolitika skandalo en la postmilita historio de Germanio.

***Wirecard*: kronologio de fraŭdo**

La entrepreno *Wirecard*, fondita en 1999, estis (laŭpercepte) sukcesa fincnserva entrepreno, kiu specialiĝis pri elektronika



La entrepreno Wirecard estis laŭpercepte sukcesa financserva entrepreno, kiu specialigis pri elektronika monĝirado, riskomastrumado kaj emisiado de kreditkartoj.

monĝirado, riskomastrumado kaj emisiado de kreditkartoj. En tiu kadro ekzistis ankaŭ *Wirecard Bank* kiel branĉokompanio de *Wirecard* mem. Sed jam longe antaŭ sia nesolventeco *Wirecard* aperis en la titoloj de financgazetoj. En 2015 la brita *Financial Times* (FT) unuafoje raportis tre kritike pri la ekonomia konduto de *Wirecard*. En la artikolo oni publike akuzis tiun entreprenon pri koruptado, monlavado kaj fraŭdo. Kaj kvankam la kurzo de la akcioj de *Wirecard* dum mallonga tempo falis, la financa merkato kaj la investantoj rapide forgesis pri la riproĉoj de FT.

Nur en 2019 denove aperis kelkaj kritikemaj raportoj en *Financial Times*. Ĉi-foje oni raportis pri suspekto de kontrakto-falsado, falsitaj fakturoj kaj falsado de bilancoj en Singapuro cele al monlavado. FT raportis ankaŭ, ke ĝi havas

dokumentojn, kiuj pruvas, ke almenaŭ du entreprenestroj en Germanio scias pri la manipulado en Azio. Kaj nun reagis la institucioj: sekvis priserĉoj de la oficejo en Singapuro, kaj en Usono oni intencis jure akuzi la borse kvotatan entreprenon. Sed la katastrofo venis nur la 18an de junio 2020: en tiu tago la germanaj revizoroj sciigis la estraron de *Wirecard*, ke mankas pruvo pri aktivaĵo de 1,9 miliardoj da eŭroj. Samtempe ili sciigis al *Wirecard*, ke tre verŝajne temas pri trompo. En la borso kolapsis la kurzo de *Wirecard*, kaj la ĝistiamia ĈEO Marsalek forlasis Germanion nur kelkajn horojn post la akuzo de la revizoroj. Lia celo estis supozeble Belorusio.

Kion sciis Olaf Scholz?

Ĝis nun ne tute klaras la rolo de la nuna federacia kanceliero Olaf Scholz en la tuta skandalo. Sciatas nur, ke li iel implikiĝis en ĝi.

Betrug in Milliardenhöhe

Die Staatsanwaltschaft München I, das Polizeipräsidium München und das BKA bitten um Ihre Mithilfe!

Jan MARSALEK, Ex-Vorstandsmitglied der Wirecard AG, steht in dringendem Verdacht, sich des gewerbsmäßigen Bandenbetrugs in Milliardenhöhe, des besonders schweren Falls der Untreue und weiterer Vermögens- und Wirtschaftsstraftaten strafbar gemacht zu haben. Aktuell befindet er sich auf der Flucht.

Jan MARSALEK *15.03.1980

Können Sie Hinweise zum Aufenthaltsort von Jan MARSALEK geben?

Wir bitten Sie, Ihre Hinweise dem PP München unter +49 (0) 89/2910-0 oder jeder anderen Polizeidienststelle mitzuteilen. Außerdem können Sie hierfür das Kontaktformular der Polizei Bayern unter www.polizei.bayern.de nutzen. Ihre Hinweise können vertraulich behandelt werden!

La iama ĈEO de Wirecard, Jan Marsalek, tuj post anonco de ties nesolventeco subite malaperis kaj kun li miliardoj da eŭroj de investintoj



En 2020, kiam la tuta skandalo eniris la publikan sferon, Scholz estis federacia ministro pri financo en la lasta registaro de Angela Merkel

Lia implikiĝo okazis kiam li ankoraŭ ne estis kanceliero. En 2020, kiam la tuta skandalo eniris la publikan sferon, Scholz estis federacia ministro pri financo en la lasta registaro de Angela Merkel. En tiu pozicio li estris ankaŭ la federacian financkontrolan institucion *BaFin*, kies tasko estas interalie la kontrolado de la germana financa merkato. Sed kiam la skandalo fariĝis publika, la publikan atenton en Germanio dominis la kovim-pandemio kaj ties sekvoj. La pande-

mio kaj la tiama vakcinad-haoso en Germanio dominis ankaŭ la balotbatalon de 2021. Nur tiel klarigeblas, kiel Scholz tamen povis fariĝi la kancelierkandidato de la socialdemokrata SPD kaj la oponento de la kancelierkandidato de la kristan-demokratoj gvidataj de Angela Merkel. La skandalo de *Wirecard* malaperis el la publika atento.

Post la parlamentaj balotoj en septembro 2021, kies rezulto ebligis la enoficiĝon de nova koalicio kun Olaf Scholz kiel kanceliero, la pandemio malpliseverigis. La amaskomunikiloj nun pli akre kaj ofte raportis pri la skandaloj de la nova kanceliero Scholz. Skandaloj, ĉar *Wirecard* ne estas la sola makulo en la politika kariero de Olaf Scholz. Li estas implikita ankaŭ en alia granda ekonomipolitika skandalo eĉ kun internacia dimensio: la skandalo *Cum-Ex*, supozeble kiam li ankoraŭ estis urbestro de Hamburgo. Temas pri granda (kaj ne limigita nur al Germanio) financa skandalo, en kiu per imposta fraŭdo jam nur en Eŭropo estis defraŭditaj kelkaj miliardoj da eŭroj. Raportado pri ambaŭ skandaloj ekde 2022 estas tre ofta en la germanaj amaskomunikiloj.

Ankaŭ pri maldiligentemo de la justico oni plendi ne povas: ekde 2020 unu el la iamaj ĉefmanaĝeroj de *Wirecard*, la aŭstro Markus Braun, sidas en poresplo-ara aresto en Munkeno. En

junio 2021 parlamenta esplorkomisiono konkludis, ke pro sia tiama funkcio kiel ministro pri financo Olaf Scholz estas almenaŭ politike respondeca en la skandalo *Wirecard*. Tamen post somero 2021 ne multo plu okazis: en septembro 2021 estis la balotoj al la germana federacia parlamento *Bundestag*, kaj la emo de la nove enoficiĝinta kanceliero Scholz al kunlaboremo kun la justico post la balotoj ankoraŭfoje malaltiĝis.

Se aperas demandoj al li pri lia implikiĝo en la skandalon, li ĉiam ripetas, ke li simple ne plu memoras. La forgesemo de la nova kanceliero intertempe fariĝis kvazaŭ reala satiro en Germanio. Sed sen gravaj ĉefatestantoj la justico ne multon povas vere klarigi. Ni memoru, ke ekzemple la iama ĈEO de *Wirecard* (la ĉefatestanto Marsalek) malaperis al Belorusio kaj de tie supozeble al Rusio. Kaj tio levas aliajn demandojn – ekzemple la demandon, kigrade la skandalo havas ankaŭ eksterlandan kaj sekurecpolitikan dimension.

Kie kaŝiĝas la iama ĈEO Marsalek?

La komenco de la milito en Ukrainio en februaro 2022 kaj la ofte kritikata germana sinteno al ĝi donis novan eksterapolitikan dimension al la skandalo *Wirecard*. Ne malmultaj observantoj en Germanio kre-

dis, ke la supozata restado de Marsalek en Rusio estas la kialo por la (komence) hezitema germana politiko koncerne milithelpon al Ukrainio. Oni opiniis, ke la rusia prezidanto Putin ĉantaĝis Scholz-on laŭ la maniero: „Aŭ vi restu kvieta, aŭ mi ekparoligos Marsalek-on”. Post unu jaro de milito en Ukrainio kaj kelkaj ŝanĝoj en la germana aliro al la ukraina konflikto tiu hipotezo verŝajne ne plu estas sencodona. Tamen restas la demando, kie kaŝiĝas Marsalek. Kaj eĉ pli grave: kiu kaŝas lin, kaj kial?

Ĉu *Wirecard* kaŭzos politikan krizon?

La skandalo tenas Germanion en suspenso. Nun, kiam la pandemio ne plu superregas la publikan atenton, la germana publiko pli atente sekvas la evoluon de la situacio ĉirkaŭ *Wirecard*. La nedubebla implikiĝo de la kanceliero Scholz en ĝi ŝarĝas lian registaron. Ju pli la justico malkovras, des pli granda ŝajnas esti la forgesemo kaj nekunlaboremo de Scholz. Kaj kvankam la justico senhalte laboras pri klarigo de la skandalo, la obstakloj daŭre estas altaj: la ĉefatestantoj aŭ ne volas depozicii, aŭ fuĝis. Unu el la atestantoj ja estas Scholz mem, sed ĝis nun li rifuzis ĉian fruktodonan kunlaboron kun la justico koncerne la skandalon pri *Wirecard*.

La demando estas, kiom longe ankoraŭ daŭros la jura

klarigo de la skandalo. Ŝajnas, ke ĝi ne finklariĝos dum la nuna parlamenta periodo de la registaro de Scholz. Sed la situacio estas „flua”, ĉiam aperas novaj, surprizaj evoluoj. La jura klarigo pri la skandalo ĉirkaŭ *Wirecard* ankoraŭ havas potencialon por granda politika tertremo en Germanio.

Pri Olaf Scholz

Olaf Scholz naskiĝis en 1958 en Osnabrück (nord-okcidenta Germanio). Jam kiel junulo li fariĝis membro de la socialdemokrata partio (SPD). Li studis jurosciencon en Hamburgo (1978–1984) kaj post siaj studoj estis civilservanto (anstataŭ militservi) dum 16 monatoj. Ekde 1985 li laboris kiel advokato en Hamburgo.

En 1998 li eniris la federacian politikon kaj elektiĝis kiel deputito (por Hamburgo) en la germanan federacian parlamenton *Bundestag*. En 2011 li demisiis kiel deputito kaj fariĝis reganta urbestro de Hamburgo. En 2018 li revenis al la federacia politiko kaj fariĝis ministro pri financo en la lasta registaro de Angela Merkel. Fine li estis kancelierkandidato de SPD por la parlamentaj balotoj en 2021, kaj en decembro de la sama jaro *Bundestag* elektis lin kiel federacian kancelieron de Germanio. Li estas estro de maldekstra-liberala koalicio. ■

KULTURO

Materia kaj spirita entoj

Nikita **PIMENOV**
Rusio

*En Rusio estas moro
baki blinojn dum
Butersemaĵno. Multaj homoj
jam ne pensas pri la sankta
kaj spirita signifoj
de ĉi tradicio.*



ALEX BRYCA

Tradicie, kulturo estas dividita je materia kaj spirita. Al la materia kulturo rilatas ĉio, kio estas kreita en procezo de produktado, t.e., ĉio kio estas farita per homaj manoj aŭ maŝinoj, ankaŭ kiujn homoj kreis. Tio estas ĉio, kion vi povas tuŝi aŭ vidi. La objektoj de materia kulturo estas naturo kaj aĵoj – ĉio materia.

La spirita kulturo inkludas produktojn de la spirita kreivo de homoj, ekzemple sciojn, formojn de pensado, mondrigardojn. La objekto de spirita kulturo estas la homa konscio, ties intelektaj kaj mensaj kapabloj. Tamen, tiu distingo estas

kondiĉa, ĉar neniuj materia objektoj povas esti kreita sen ideo, alioĉaze ĝia ekzisto estus sensenca. Ĉu la materia kaj la spirita kulturoj rilatas unu al la alia? Sendube. Subtene al miaj vortoj mi donos kelkajn argumentojn.

Argumentado

En la moderna mondo ekzistas almenaŭ tri aspektoj, kiuj reprezentas simbiozon aŭ eĉ sinergion de la spirita kaj la materia kulturoj. Komence ni notu, ke la naturo de spirita kaj materia entoj estis studata de filozofoj en ĉiuj epokoj, ekde la antikveco. La instruo de Budho diras, ke prospero estas necesa kondiĉo por

homa bonfarto, kaj ankaŭ, ke spirita evoluo kaj morala pliboniĝo estas kondiĉoj por feliĉa, trankvila kaj kontentiga vivo. Aŭ, ekzemple, Platono, strukturante sian ideon pri objektiva idealismo, prezentas la tezon, ke „karno, materio estas pasiva per si mem kaj ricevas sian tutan realecon nur de la spirita principo”. En la unua okazo, ni vidas la ideon de harmonia kunekzisto de spirita kaj materia entoj, en la dua superregon de la unua super la dua. Tamen, al la filozofo F. Ŝillero kaj F. Hegelo apartenas la ideo de la kunordigo de la natura kaj la spirita esencoj de la homo. Tio estas, ke jam en la 19a jarcento la homo estis

traktata kiel simbiozo de la spirita kaj la materia entoj, kiel kombinaĵo de la korpo (naturo) kaj la spirito. Tiel, ĉiu aĵo kreita de la homo estas parte aŭ tute produkto de sinkretisma kuniĝo de la materia kaj la spirita entoj.

Sed ni revenu al la tri aspektoj. Mi asertas, ke religio, tradicioj kaj arto (en ĉiuj ĝiaj manifestiĝoj), t.e., aspektoj de la homa kulturo, povas esti atribuitaj al la materia kaj la spirita entoj samtempe. Ni rigardu konkretajn ekzemplojn.

Religio

Kio estas religio? „Religio estas unu el la formoj de socikonscio – aro de ideoj

bazitaj sur fido je miraklaj supernaturaj fortoj kaj estaĵoj (dioj, spiritoj), kiuj estas objekto de kultado.” La difino ne estas sufiĉe preciza, laŭ mia opinio. Religio, fakte, estas kredo plus kulto. Sed tiam ni devas klarigi, kio estas kredo.

Kredo estas (el la vidpunkto de filozofio) „akcepto de iuj proponoj sen teoriaj kaj praktikaj pruvoj” (mallonga vortaro de filozofiaj esprimoj). Kio estas kulto? Kulto estas „religia servo al diaĵo kaj religiaj ritoj rilataj al tiu servo” (Vortaro de la rusa lingvo, red. A. Jevgenjeva).

Nun, kiam ĉiuj terminoj estas sciigitaj, ni povas plui al klarigo en la kunteksto de la temo de ĉi eseo.

Fakte, kredo estas objekto de homa konscio, t.e., objekto de la spirita kulturo. Kaj kulto, siavice, – al kiu ajn religio ni referencus – rilatas al difinitaj aĵoj, objektoj de kultado: idoloj, totemoj, sanktaj lokoj, sanktaj libroj, t.e. kulto rilatas al objektoj de la materia kulturo. Tiel, religio estas simbiozo de la spirita kaj la materia kulturoj.

Ekzistas tiaĵo kiel „tradicioj”, kiuj estas tre proksimaj al religio. En la Klariga Vortaro de S. Ojegov ni legas: „Tradicio estas 1. Tio, kio trapasis de unu generacio al alia, kio estas heredita de antaŭaj generacioj (ekz. ideoj, opinioj, gustoj, agmaniero, moroj). 2. Moro, establita ordo en konduto, en ĉiutageco.” Laŭ mia opinio,

la dua difino estas malĝusta, ĉar la komprenoj de „moro” kaj „tradicio” povas esti distingitaj. La lasta estas multe pli ĝenerala. Dum moro – heredita stereotipa maniero de konduto, kiu estas reproduktata en certa socio aŭ socia grupo kaj estas kutima por ĝiaj membroj – ne influas ĉiujn sferojn de homa agado.

Redifine

Redifininte la terminojn, ni povas doni pli mallarĝan kaj konkretan ekzemplon por pruvi la supran diradon. En Rusio estas moro baki blinojn dum Butersemajno. Multaj homoj jam ne pensas pri la sankta kaj spirita signifoj de ĉi tradicio. Tiu festo ĉiam estis kaj estas okazigata antaŭ Karesmo, la Granda Fasto. Tio estas, unuflanke, por satmanĝi antaŭ la komenco de kelkaj restriktaj pri manĝaĵo, aliflanke – por „renkonti printempon” kuirante blinojn – simbolon de la suno – glorantajn la Sundiojn mem, kiujn kultis paganaj slavoj. Tial, ĉi festo samtempe inkludas du objektojn de la spirita kaj unu objekton de la materia kulturoj, nome, paganan kaj kristanan kredojn kaj difinitan tradicion kuirrecepton. Sekve, tradicioj vere estas simbiozo de la du specoj de kulturo menciitaj pli supre.

Kiel vi scias, kaj religio kaj tradicio implicas kreon de artaj objektoj. Bedaŭrinde, la esprimo „arto” mem

estas tre malbone difinita en diversaj fontoj; tial ni apogos nin sur ekzistantaj artobjektoj por klarigi nian pozicion.

En religio kaj tradicioj estas funkciigataj arkitekturo, juvelarto, arto, muziko, literaturo, teatro (ekzemple, religiaj procesioj aŭ tradiciaj festadoj). Kompreneble, ĉiu speco de arto povas esti nomata sinkretisma objekto de spirita kaj materia kulturoj.

Ni analizu kelkajn banalajn, sed ilustrajn ekzemplojn. Imagu, ke vi havas libron antaŭ vi. Libro, kiel objekto, estas fenomeno de la materia kulturo. Kial? Ĉar ĝi estas farita el papero, kaj krei libron postulas homan produktadon. La libro enhavas tekston. Se estas maleble enmeti libron kiel materialan objekton en nian konscion, ni povas do fari similan manipulado pri ĝia enhavo, ni povas kompreni la skribitan tekston danke al la penskapablo. Tiu konscio pri io skribita estos objekto de spirita kulturo.

Kaj nun ni supozu, ke ni venis al artgalerio, kaj ni havas antaŭ ni la majstraĵon de Ivan Ajvazovskij „Teodozio. Luna nokto”. Unu el la plej famaj pentraĵoj estas materia enkorpiĝo de la spirita ento. Kial? Unue, kreante verkon, la pentristo devis ekhavi materialojn – brosojn, farbojn, paletojn, tolon ktp. Ĉiuj tiuj aĵoj, inkluzive de la pentraĵo mem, estis kreataj de homo. Due, Ajvazovskij,

estante marpentristo, estis inspirita de marpejzaĝoj. Li travivis ĉiun nuancon de koloro, li sentis la naturon subtile, provante per si propran vidon sur tolon en la plej etaj detaloj. Sekve, ĝuste pro la movoj de la animo (skeptikuloj diros, ke pro la specifaj de pensado), la artisto kreis objekton de spirita kulturo – bildon de nokta haveno en Krimeo.

Muziko

Ĉi tie ĉio estas sufiĉe simpla: muzikinstrumento, notoj, plenumanto, aŭskultanto. Ĉi tiu sinsekvo inkludas la spiritan kaj la materialan, objektojn kaj ĝian speguligon en la konscio de pluraj subjektoj. Tial, sen spirita kulturo, kiel ni vidas, ekzistus neniu materia kulturo, kaj sen materia kulturo, ni ne povus enkarnigi la spiritan kulturon.

Ni povas konkludi, ke arto, almenaŭ kelkaj el ĝiaj tipoj tutcerte, reprezentas simbiozon de la spirita kaj la materia principoj en kulturo.

Tiel, ĉiuj el la supraj ekzemploj montras ĝuste, kiel la tri plej gravaj objektoj de kulturo – religio, tradicioj kaj arto – inkludas la spiritan kaj la materialan entojn. Simila interpenetro ekzistas en aliaj aspektoj de homa vivo, ĉar persono estas simbiozo de la spirita kaj la materia entoj. Havante la kapablon kompreni kaj pensi, li aŭ ŝi povas krei kaj senti kion ajn. ■

RAKONTO

Maks, Lora kaj Roland

Julian **MODEST**

La bordo estis alta, malsupre la rivero similis al longa arĝenteca robtreŝaĵo, naĝante lante sur la etaj ondoj. Du grandaj riveraj ŝipoj videblis ankritaj ĉe la kontraŭa bordo. La fremdlandaj turistoj, kiuj venis per la ŝipoj, eble jam promenas kaj rigardas la vidindaĵojn de la urbo. Blovis malvarmeta vento, sed la suno brilis, kaj la ĉielo similis al travidebla helblua vitro, bone lavita.

Roland longe rigardis la riveron, provante restarigi ĉion, kio okazis dum la lastaj tagoj kaj kio renversis lian ordinaran trankvilan vivon. Kvazaŭ subita ŝtormo estus atakinta lian domon kaj ruiniginta ĉion.

Jam de dek jaroj li kaj Lora estis geedzoj, sed ili ne havis infanon. Tamen ĝis nun ilia familia vivo estis sennuba kiel la ĉi-matena blua ĉielo. Lora neniam montris sian turmenton, ke ŝi ne povas gravediĝi. Roland bone komprenis ŝin kaj ĉiam evitis menciion pri infanoj. Ambaŭ konversaciis pri diversaj temoj, sed

gardis sin kiel de fajro hazarde tuŝi la infanproblemon. Roland certis, ke neniam ili havos infanon, kaj laŭ li Dio tiel decidis.

Fama advokato, Roland havis plezuron de sia laboro kaj malofte pensis pri infano. Lora, kiu parolis tri fremdajn lingvojn, laboris kiel tradukistino ĉe konata libroeldonejo kaj tradukis romanojn, novelarojn, filozofiajn verkojn. Ĉiuj, kiuj konis ŝin, ofte diris, ke ŝi estas tre talenta tradukistino, tamen la laboro ne tre plezurigis ŝin.

Sabate kaj dimanĉe, kiam Roland kaj Lora promenadis, Roland ofte rimarkis la kaŝitan sopiran rigardon de Lora, direktitan al iu eta infano preterpasanta ilin kun siaj gepatroj. En tiuj ĉi momentoj Roland tamen ŝajnis, ke li ne vidas la sopiron en la okuloj de Lora.

Iliaj familiaj tagoj pasis preskaŭ enue. Kiam Lora finis la tradukon de iu romano, ŝi tuj komencis novan tradukon. Roland konstante estis okupata, ĉar li pledis dum multaj juĝprocesoj.

Ordinare jam dum Kristnasko li kaj Lora komencis plani, kie ili somerumos dum la venonta jaro. Tre agrable estis serĉi ekzotikajn lokojn ie en la mondo. Ĉi-jare dum Kristnasko ili decidis veturi al Brazilo. Ili estis tie neniam kaj senpacience atendis la monaton julio, kiam ili ekveturos.

Tamen ofte planoj ne realiĝas kaj fiaskas. La maltrankvilaĵoj komenciĝis en maja tago. Eble estis la dek-kvina de majo. Roland revenis hejmen por tagmanĝi, kaj kiam li malfermis la pordon de la loĝejo, li vidis knabeton, eble unujaran, kiu rampas sur la planko en la vestiblo. Tio ege surprizis kaj iom timigis Roland, ĉar li preskaŭ surpaŝis la knabeton. Roland haltis stuporigita kaj laŭte diris:

– Lora, mi revenis.

– Jes, mi aŭdis – respondis Lora el la ĉambro, en kiu ŝi estis kaj laboris, eble tradukante iun tekston.

Roland deziris demandi, kiu estas tiu ĉi knabeto, sed Lora rapidis klarigi:

– Tio estas Maks, la filo de mia koleginino Greta.

– Ĉu Maks?

– Greta ekveturis ofice al Usono kaj petis min dum unu semajno prizorgi lin.

– Prizorgi Maks? – ne komprenis Roland.

Al li la klarigo de Lora ŝajnis iom stranga. Ĝis nun ŝi neniam menciis pri sia koleginino, kies nomo estas Greta. Ĉu Greta ne havas edzon kaj parencojn, kaj do ŝi petis Lora prizorgi Maks, demandis sin Roland, sed Lora plu klarigis:

– Greta ne havas edzon.

– Ĉu?

– Tio estas longa historio, tamen se vi scivolas, mi diros al vi.

– Estus interese – tramurmuris Roland.

– Greta havis amanton, kiu estis edzo, kaj plurfoje li promesis divorci, sed li ne divorcis. Greta gravediĝis, naskis Maks, tamen ne diris al li, ke li iĝis patro. La fiulo tute ne sciis pri Maks, eĉ li ne supozis, ke Maks ekzistas. Kompreneble Greta ne plu kontaktis tiun ĉi malhonestan viron.

– Mi komprenas.

– Greta ne deziras humiliĝi – diris Lora. – Ŝi decidis mem prizorgi Maks.

– Ŝi bone faris – konsentis Roland – tamen ĉu Greta havas gepatrojn?

– Ŝiaj gepatroj divorcis, kiam ŝi estis infano. Antaŭ kelkaj jaroj ŝia patrino mortis. Greta preskaŭ ne konas sian patron, kiu ne interesiĝis pri ŝi. Greta eĉ ne scias, kie li nun loĝas, kaj ĉu li vivas.

– Mi kompatas ŝin – diris Roland.

– Maks estas tre kvieta knabo – aldonis Lora – kaj li tute ne ĝenos nin. Dum unu semajno ni prizorgos lin.

– Kompreneble – konsentis Roland. – Kiam Greta devas reveni?

– Lunde.

Maks daŭre rapide rampis en la ĉambro, li proksimiĝis al Roland, per siaj etaj manoj li kaptis lian pantalonkrurumon kaj provis ekstari. Roland levis lin kaj komencis kun li promenadi en la ĉambro.

– Vidu – diris Roland – tio estas bildo – kaj li montris la bildon, kiu pendis sur la muro. Ĝi estis bela pejzaĝo de Venecio. – Tio estas seĝo kaj tio – tablo.

Maks rigardis Roland per siaj grandaj nigraj okuloj, kvazaŭ li komprenus ĉion, kion Roland diras.

Dum tri tagoj Roland tiel kutimiĝis al Maks, ke post la laboro Roland rapidis tuj reveni hejmen por ludi kun li. Foje-foje Roland eĉ nutris Maks kaj helpis Lora, kiam ŝi banis Maks. Al

Roland eĉ ŝajnis, ke Maks delonge jam estas en ilia domo.

Nun Lora aspektis senlime feliĉa. Ŝiaj okuloj, similaj al olivoj, brilis, kaj rideto konstante lumigis ŝian vizaĝon, blankan kaj glatan kiel porcelano. Ŝajne dum nur kelkaj tagoj Lora plijuniĝis, kaj ŝi kvazaŭ ne paŝis, sed flugis. Senĉese ŝi diris ion al Maks, aĉetis por li ludilojn, eĉ iujn vestojn. Tio estis komprenebla, ĉar hejme ili ne havis infanludilojn, kaj eble Greta forgesis doni kromajn vestojn por Maks.

La maja vetero estis belega, suna, kaj Roland promenadis kun Maks en la proksima parko. Kiam li estis kun Maks, Roland ne povis kaŝi sian fieron. La homoj rigardis ilin kaj eble diris al si: „Kia simpatia patro kun bela knabo.”

Estis vendredo. Roland pli frue revenis de la advokata kontoro, kaj li jam havis planon, kiel trioje Maks, Lora kaj li pasigos la feriajn tagojn. Ili veturos al la ripozejo *Kristala akvofalo*. Sabate ili tranoktos en la hotelo *Horizonto* kaj dimanĉe promenos en la bela montaro. Jes, Greta devas reveni lunde, kaj bedaŭrinde lunde ŝi prenos Maks.

Tamen en tiu ĉi vendreda tago jam en la vestiblo Roland rimarkis, ke Lora estas trista. Kvazaŭ peza malhela ombro kovris ŝian vizaĝon, kaj ŝiaj okuloj similis al du nigraj profundaj kavoj.

– Kio okazis? – demandis Roland maltrankvile. – Ĉu io al Maks?

– Ne – diris Lora.

– Tamen kio? – li jam estis konsternita.

– Greta – tramurmuris Lora.

– Kio?

– Estis aŭtokatastrofo en Ĉikago, kaj Greta mortis.

Roland preskaŭ svenis. Li tute ne atendis aŭdi tion.

– Forpasis ... kaj nun?

– Kio nun? – alrigardis lin Lora.

– Kio okazos al Maks?

– Li restos ĉe ni – diris ŝi. – Poste ni decidos.

– Kion ni decidos? – ne komprenis Roland.

– Ni povus adopti lin.

– Tio ege malfacilas.

– Ja, vi estas advokato ...

Lora eksilentis, sed post minuto firme ŝi diris:

– Ni adoptos lin!

Roland ne deziris kontraŭstari al ŝi. Li bone sciis, ke tio preskaŭ ne eblas. Maks ne havas gepatrojn, kaj leĝe oni ne povas adopti lin.

La tagoj pasis. Roland demandis Lora, kiam oni enterigos Greta. Ŝi respondis, ke tio estas tre komplikita, estas multaj formalajoj, kaj oni ankoraŭ ne sendis la ĉerkon el Ĉikago. Lora daŭre ripetis, ke Roland jam devas entrepreni la adopton de Maks, sed Roland ne rapidis.

Iun matenon bombo eksplodis. Roland ĵus preparis sin por ekiri al la juĝejo, kaj iu sonorigis. Li malfermis la pordon. La loĝ-

ejon eniris policianoj. Unu el ili tuj iris en la ĉambron, kie estis Lora kaj Maks. La policano severe diris:

– Sinjorino Veber, ni arestas vin.

Roland stuporiĝis.

– Kial? Kio okazis? Estas granda eraro!

– Ne estas eraro – la policano turnis sin al Roland.

– Via edzino ŝtelis tiun ĉi knabon.

– Tamen Maks estas filo de ŝia kolemino Greta, kiu bedaŭrinde forpasis – provis klarigi Roland. – Ni zorgis pri li, dum Greta estis ofice en Usono.

– Via edzino ne havas koleginon Greta, kaj la nomo de la knabo ne estas Maks, sed Viktor. Via edzino ŝtelis Viktor en la granda vendejo *Market*.

– Pruvu tion! – koleriĝis Roland. – Mi protestas!

– Sinjoro Veber, vi estas advokato, kaj vi bone komprenas, ke ni povas pruviti tion. Ni eĉ akuzos vin pri kunpartopreno en tiu ĉi krimo.

Roland akre reagis:

– Tio ne eblas! Ne vi, sed mi akuzos vin!

Lora alrigardis Roland kaj nur diris:

– Mi ŝtelis Maks.

En tiu ĉi momento en la ĉambro ekestis profunda silento. En la okuloj de Lora ekbrilis larmoj, kaj nun unuan fojon Roland komprenis, kiel forte Lora deziris havi infanon. Maks rampis sur la planko kaj etendis siajn etajn brakojn al Roland, por ke Roland levu lin. ■



ESEO

NITO / SHUTTERSTOCK.COM

Naturismo kaj Esperanto: komuneco de destinoj



Patrick CHEVALIER
Francio

La difino de naturismo, kiel realigita en 1974 de la Internacia Naturista Federacio, portas valorojn komunajn kun Esperanto: „Naturismo estas vivmaniero en harmonio kun la naturo, karakterizita

de praktiko de komunuma nudeco, kiu celas antaŭenigi respekton al si mem, respekton al aliaj kaj respekton al la medio.” Tiel, la ideo ĝermis inter esperantistaj naturistoj por kune efektiviĝi la celojn de ĉi tiuj du movadoj. En 1961 naskiĝis In-

ternacia Naturista Organizo Esperantista (INOE), kies statutaj celoj estas klaraj: kunigi naturistajn esperantistojn, diskonigi la naturistajn ideojn en esperantistaj medioj kaj disvastigi la uzadon de Esperanto en naturistaj medioj.

Por atingi tion INOE asertas esti sendependa demokratia organizaĵo, neŭtrala fronte al politikaj kaj religiaj ideologioj, kaj respektas la principojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, de Universala Esperanto-Asocio

(UEA) kaj de Internacia Naturista Federacio (INF).

Ĉu komuna historio?

Zamenhof eldonis la broŝuron kun la titolo *Lingvo Internacia* en 1887, sed ekde 1878, en la aĝo de 19 jaroj, li skizis unuan projekton de *Lingwe Uniwersala* responde al la ekstreme streĉa politika kaj socia lingva situacio en Pollando, lia naskiĝlando, kaj en lia urbo Bjalistoko, priloĝata de poloj, germanoj, rusoj, litovoj kaj judoj, kiuj miksiĝis tie eĉ sen kompreni unu la alian.

Naturismo dume, en sia nuntempa kaj „organizita” formo, naskiĝis en la deknaŭa jarcento sub la egido de la geografo Élisée Reclus, kaj la batalo kontraŭ tabuoj estis malfacila kaj longa.

Historiistoj povus kontesti, ke la ideo de universala lingvo devenas de Zamenhof kaj diri, ke ekzemple en la letero al Mersenne de la 20a de novembro 1629 Kartezio antaŭvidis la eblon krei klaran metodon, kiu „facile” instruus kiel liberigi sin de la komplekseco de naturaj lingvoj. Tiuj samaj historiistoj povus aldoni, ke naturismo ne atendis, ke aperu Élisée Reclus, ĉar jam en la antikveco multaj grekoj aspiris al καλὸς κάγαθός (kalos kagathos – bela kaj bona), kaj, por atingi tion, la junuloj faris nudajn sportojn, dum junaj virinoj ekzercis sin per dancado kun malpeza tuniko aŭ nude.

Emfazindas la samtempeco de apero de du strukturitaj kaj teoriigitaj movadoj bazitaj sur inkludo kaj respekto.

Ĉu komunaj malamiko?

Estante ĝemelaj fratoj serĉantaj harmonion kaj fratecon, naturismo kaj Esperanto suferis dum la dudeka jarcento la samajn ĉefajn ekzekutistojn: stalinismon kaj naziismon.

Esperanto

En la naskiĝanta sovetia epoko Esperanto ŝajnis interesa lingvo, kiu ebligis al laboristoj en la tuta mondo komunikiĝi kaj do al sovetiaj laboristoj glori la avantaĝojn de socialismo; tial la instigo al korespondado. Kiam, ĉirkaŭ 1931, la laboristoj komencis atendi personajn respondojn, kaj ne oficialan propagandon, Esperanto fariĝis danĝera, ĉar ĝi rajtigis rektajn rilatojn per privata korespondado, kio estis malfacile kontrolebla. Krome, ĉar esperantistoj rekonis ĉiujn lingvojn kaj ĉiujn etnojn, la universala lingvo trovis favoran eĥon inter nerusaj popoloj dum severa politiko estis entreprenata kontraŭ ili.

Por Stalin ĉiu epoko havas ian mondlingvon: la latinan en Mezepoko, la francan en la 18a kaj 19a jarcentoj, kaj la rusa estos la lingvo de la popolaj respublikoj. Kaj esperantistoj, kiuj plu praktikas sian in-

ternacian lingvon, trovas sin en gulago¹. La diktatoro estigis en 1937/1938 „grandan purigon”, kiu kaŭzis la morton de preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kiuj per multnombraj kontaktoj kun eksterlando havis la kapablon rompi la monopolon de la Komunista Partio, instrumento de la dezirata absoluta potenco de Stalin.

Komence de la 1930aj jaroj la tre forta centra potenco trudis la rusan kiel oficialan lingvon de la tuta Sovetio, kio nuligis la principon de Lenin, laŭ kiu en socialisma ŝtato ĉiuj lingvoj havu la samajn rajtojn. Krome, la tradicia internaciismo de la sovetiaj esperantistoj konfliktis kun la decido ne eksporti la revolucion ekster Sovetion. Stalin tamen parolis pri la lingva problemo en la estonta mondsocialisma socio. Antaŭ 1930 li pensis, ke en la epoko de komunismo la naciaj lingvoj kunfandiĝos al komuna lingvo, penso relative favora al la ideo de internacia konstruita lingvo. En 1950, pli inspirite de imperiismo, li deklaris, ke kiam du lingvoj kontaktiĝas, nur unu postvivis kaj venkinte konservas sian gramatikon kaj sian bazan leksikon, dum la alia iom post iom velkas. En ĉi tiu koncepto evidente ne plu

estas loko por la ideo de komuna internacia lingvo.

En Nazia Germanio de 1933 ĝis 1945 estis rezisto de esperantistoj, kiujn la nazioj torturis, malliberigis en tendaroj, mortigis, ĉar por ili Esperanto, inventaĵo de judo, devas esti elradikigita. *Reichssicherheitshauptamt* (Ĉefa oficejo pri sekureco de la regno) organizis tiun subpremon, kiu estis akompanata de la deziro sklavigi kaj subpremi la rajton de judoj kaj slavo interkomunikiĝi. Por Hitler la negermana loĝantaro devis kompreni nur naziajn ordonojn.

Kiam la nazioj invadis Pollandon, Adamo, la filo de Zamenhof, estis arestita kaj pafekzekutita, kaj la familio de Zamenhof estis ekstermita en Treblinka. La nazioj etendis sian politikon al okupaciataj landoj, precipe en orienta Eŭropo; ilia subpremo estis malpli severa en okcidenta Eŭropo. Jam en 1937, dum la Varsovia Kongreso, la loka faŝisma gazetaro atakis la polan registaron, kaj la Esperanto-Kongreso estis priskribata kiel „jud-komunista”.

Naturismo

En 1924 en la novnaskita Sovetio la organizaĵo „For la honto” organizis grandajn civitanajn marŝadojn, kie la partoprenantoj estis nudaj, por kontraŭstari „burĝan moralon”. En tiu movado la poeto Vladimir Majakovskij estis

1. Konfirmo en 1987, kiam oni povis malfermi oficialajn dokumentojn, laŭ kiuj esperantistoj estis inter la multaj homoj trafitaj de la subpremoj. (Ulrich Lins, *La danĝera lingvo*)

fervora aktivulo. Post la morto de Lenin la etoso radikale ŝanĝiĝis: „For la honto” estis malpermesita de la sovetiaj aŭtoritatoj en 1925 kun la preteksto, ke la kunvenoj ĝenas la publikan ordon. Monogamio estis deva kaj seksumado antaŭ geedziĝo oficiale malpermesita. Stalin malpermesis abortigon, adulton, samseksemon, masturbadon same kiel nudismon kaj pornografion. De tiam la korpoj devis esti je la servo de laboro, sporto kaj konstruado de komunismo.

Koncerne naturismon la nazia doktrino estas resumita en la penso de Hermann Goering: „Nudismo subpremas la naturan pudoron de virinoj kaj senigas virojn je ĉia respekto por virinoj, tiel subfosante la fundamentojn de kulturo inda je tiu nomo.”

Per dekreto de la 3a de marto 1933 Goering malpermesis nudbanadon kaj nudajn subĉielajn agadojn sur la germana teritorio.

La plimulto de naturistaj publikaĵoj kaj revuoj estis detruitaj. Nazia kontraŭnaturismo estis apogata de la papo Pio la 11a.

La nazia polico ĉasis naturistojn kun la celo detrui ilian movadon kaj konfiski ilian teron. Pluraj estis malliberigitaj, deportitaj. La naturistaj organizaĵoj, tre atente rigardataj, provis kaŝe daŭrigi malgraŭ ĉio. Junulmovadaj ligoj, kiel ekzemple *Wandervögel* (promenbirdoj) estis dissolvitaj kaj integritaj en la Hitler-junularon.

Hans Surén, nomumita inspektoro pri fizika edukado ĉe *Reichsarbeitsdienst* (Regna laborservo), evoluigis novan nazian koncepton: fizika edukado diferen-cigita laŭ rasoj. En sia libro *Mensch und Sonne* (homo kaj suno), precipe ŝatata de Hitler, li rekomendis nacian naturismon, kie la koncepto de pura ĝermana raso estis elstarigata tra fizika ekzercado kaj nudeco. Tio tiel devigis ĉiun individuon

konservi sian korpon laŭ eŭgenika perspektivo. La kulto al beleco komenciĝis.

La nazioj konvinkigis per la diskurso, ke iuj naturistoj kiel Surén povas adaptiĝi al ilia ideologio. En 1935 kelkaj terenoj estis redonitaj al naturistoj, permesante al ili praktiki sporton kaj sunbanadon tute nude. Sed la kosto estis totala submetiĝo al la nazia reĝimo. Tiel alprenante la principojn de rasa selektado, la naturistoj, sen tion deziri, disvastigis naziajn ideojn.

Nur pornaziaj naturistaj organizaĵoj komunikis per gazetoj, kiuj ne ekzistis antaŭ la starigo de la Tria Regno². La aliaj naturistaj asocioj ĉesigis ĉian publikigon ekde 1933. Malgraŭ ĉio nur en 1942 la reĝimo decidis laŭleĝigi naturismon.

2. Ĉi-okaze ne temas pri malnovaj naturistaj asocioj, kiuj fariĝis naziaj, eĉ se Richard Ungewitter, unu el la plej gravaj pioniroj de la germana naturismo, ŝajnis iom flirti kun arĵaj tezoj sub naziismo.

Nova dekreto estas publiki-gita, rajtigante naturistojn senvestiĝi sur strandoj aŭ ĉe lagoj, kondiĉe ke ili estu certe ne vidataj de aliaj.

Post la dua mondmilito okazis reviviĝo de multaj naturistaj asocioj. Ili tre forte rifuzis la ekscesojn truditajn de la nazia reĝimo, kaj krome evoluigis sian projekton de kultura kaj socia reformo al praktiko de naturismo rezervita antaŭ ĉio por momentoj de libertempo kaj malstreĉiĝo. ■



Patrick CHEVALIER
estas honora membro
kaj kunfondinto de
*Association Naturiste
Phocénne*, Marsejla
Naturista Asocio.

Pliaj informoj pri Internacia
Naturista Organizo Esperantista ĉe
<https://www.esperanto-naturismo.org>.



“**Naturista Vivo**”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.

La revuo aperas 4-foje jare,
sur 16 paĝoj.


Internacia Naturista
Organizo Esperantista.
Adreso: József Németh, HU-8531
Ihász, Fő u. 41/5.
Rete: jozsef.nemeth@gmail.com.

PENTRARTO

Pentristo de la nigro



Renée **TRIOLE**
Francio



La 26an de oktobro 2022 mortis en Francio la escepta pentristo Pierre Soulages. Muzeo nur por li troviĝas en lia naskiĝurbo, Rodez.

ANIBAL TREJO / SHUTTERSTOCK.COM

La 26an de oktobro 2022 mortis en Francio la escepta pentristo Pierre Soulages [pjer suláj], por kiu nigro estis koloro kaj lumo kaj kies verkoj estis honorataj jam dum lia vivo (nur Chagall kaj Picasso ĝuis la samon). Nacia omaĝo okazis en la kvadrata korto de la muzeo *Louvre*.

Infaneco kaj formiĝo

Soulages naskiĝis en 1919 en suda Francio en simpla familio (la patro estis karoseriisto), lernis en katolika internulejo kaj estis edukita de „du patrinoj”

(patrino kaj pli aĝa fratino). Fascinite de malnovaj ŝtonoj kaj foruzitaj materialoj, li malkovris la romanikan arton en la abatejo Sainte Foy de Conques. Nur 8-jara li desegnas per nigra inko neĝan pejzaĝon „por igi la blankon de la papero pli blanka, pli luma ol neĝo”. En 1934 li pentras vintrajn pejzaĝojn kaj nigrajn senfoliajn arbojn, kio estos lia stilo. Post la abiturienta ekzameno li instaliĝas en Parizo, provas konkurse eniri Belartan Altlernejon, sed ne ŝatas ties konformismon.

En 1940 li estas mobilizita, restas en pluraj urboj,

preparas la konkurson por igi instruisto pri artoj. En oktobro 1942 li edziĝas kun Colette Llaurens, kun kiu li vivos 80 jarojn. Li kontraŭas kaj evitas la devan laboron en Germanio per falsaj dokumentoj. En 1943 li konatiĝas kun pentristino Sonia Delaunay, kiu konatigas lin kun abstrakta arto. „Vi pentras per nigro kaj blanko, vi kaptas pentraĵon ĉe la kornoj, tio estas magio”, diris al li recenzisto.

Unuaj ekspozicioj kaj ekfamiĝo

Li restas ĉe nigro, pentrante per karbonkrajono, ju-

glanda inko kaj ekde 1948 gudro sur vitraĵo. Tiuj malhelaj pentraĵoj estas rifuzitaj de la Aŭtuna Salono en 1946, sed akceptitaj de la Salono de Sendependuloj pro „impresa simfonio de malhelaj koloroj”. En majo 1949 pentraĵo unuafoje estas aĉetita de muzeo (en Grenoblo) post lia unua persona ekspozicio. De 1949 ĝis 1952 li pentras dekoraĵojn por teatro, dum liaj verkaĵoj estas ekspoziciitaj en Novjorko (en 1950). En 1960 li pentras vitraĵojn en Akeno (Germanio), muran ceramikaĵon en Pittsburgh (Usono), proponas



SERGIO CALLEJA

Nigra pentraĵo, 1985.



PEDRO RIBEIRO SIMÕES

Pentraĵo, 1954.



GANDALF'S GALLERY

Pentraĵo, 1951.

afiŝon por la Olimpiaj Ludoj en Munkeno en 1972. Pierre Soulages engaĝiĝas kaj fondas Komitaton de Intelektuloj por Eŭropo de Liberecoj. Poste li estas inter la kreintoj de la franc-germana televidstacio ARTE. Dume li plibonigas sian teknikon por elstarigi nigron. Li pentras, aldonas kaj forprenas nigran farbon: „Nigro ĉion invadas ĝis tiu punkto, ke ŝajne ĝi ne plu ekzistas”. Tio klaras dum ekspozicio en la pariza muzeo Pompidou: reflektiĝas lumo sur nigraj surfacoj.

Famo kaj agnoskiĝo

La franca ministrejo pri financo mendas de li pentraĵojn, same la ministro pri kulturo Jack Lang en 1986. Li plu pentras per diversaj materialoj: 104 vitraĵoj de la abatejo Sante Foy de Conques, kie li malkovris romanikan arton. En 2004 (li estas 85-jara) li malkovras akrilon. Malfermiĝas nova muzeo nur por li en Rodez, suda Francio; aparta salono en la muzeo Fabre de Montpellier.

Li kutimis diri „Mi ne priskribas, mi pentras”. Laŭ recenzisto lia verko dividiĝas inter 5 periodoj sed restas la karakterizo de nigro:

- 1946-1952: preparaĵoj kun juglanda tinkturo, vireco
- 1949-1956: formoj-signoj, kvazaŭa kojno-forma skribaĵo

- 1956-1963: koloroj (blanko, ruĝo, bluo) kovras tolaĵojn, estas kovritaj de nigro, poste skrapita por ke reaperu koloro
- 1963-1971: unukoloraĵo aplikita per larĝa peniko kaj tirita de maldekstro dekstren
- 1972-1978: surpapera laboro, akvaforto, litografio kaj serigrafio. Li faris 118 verkaĵojn, eldonitajn en po 65 ĝis 300 ekzempleroj.

Li pentris 1700 pentraĵojn, kiuj troviĝas en muzeoj tra la tuta mondo. Li estis franca pentristo inter la plej multekostaj sed ĉefe rara pentristo, kiu jam famiĝis dum sia vivo. Ni komparu kun Van Gogh, kiu devis plorpeti du ovojn kaj kompanse farbis pordon de la kokinejo, por ne morti pro malsato! Soulages estis dediĉita al sia suda regiono (kaj sia edzino), gloris nigron kiel koloron, sed ne kreis skolon. ■

**Renée TRIOLLE**

estas emerita instruistino de la rusa lingvo kaj uzas Esperanton de 1960. Ŝi estas la unua virino iĝinta vicprezidanto de UEA, kiun ŝi reprezentis en Unesko dum 20 jaroj.

MUZIKO

Milito kaj arto



Cho Sung Ho

korespondanto de MONATO en Koreio



Statuo
de Ĉajkovskij
en Krimeo.

БОРИС МАВРОТОВ

La korea virtuoza Cho Seong-jin ludis la duan pianokonĉerton de Raĥmaninov kun la orkestro Viena Filharmonio en *Carnegie Hall* la 25an de februaro 2022. Tio estis premiera prezentado de la laŭreato de la Piano-konkurso Chopin kunlabore kun la Viena Filharmonio.

La koncerto tamen triris atenton ne pro lia sukcesa debuto kun la prestiĝa orkestro. La pianisto, laŭ urĝa invito de *Carnegie Hall*,

devis haste flugi de Berlino, kie la solisto bazas sian aktivadon, al Novjorko por ludi en koncerto ne por li origine aranĝita. Ĝi estis ludota de rusa pianisto sub la direktado de la rusa dirigento Valerij Gergijev, sed ilia prezentado estis retirita laŭ komuna decido de *Carnegie Hall* kaj la Viena Filharmonio, tuj post kiam ekis la ukraina milito la 24an de februaro. Ambaŭ rusaj muzikistoj publike subtenis la rusan aneksadon de Krimeo en 2014. *Carnegie Hall*

plie nuligis koncertojn de la rusa Orkestro Mariinskij estrata de la sama dirigento.

Premo al rusaj muzikistoj

Valerij Gergijev, konata kiel proksimulo de Putin, estis maldungita ankaŭ kiel ĉefdirigento de la orkestro Munkena Filharmonio, ĉar li ne respondis al publika ultimato, ke li distanciĝu de la rusia prezidento. Krome li devigite rezignis sian pozicion kiel honora prezid-

anto de la internacia festivalo en Edinburgo, ĝemela urbo de Kijivo. *La Scala* en Milano por opero substituis al li alian dirigenton, kaj la Roterdama Filharmonio nuligis lian prezentadon en muzikfestivalo.

Alia fama rusa muzikisto influita de la milito estas la primadono Anna Netrebko. La Metropola Opero en Novjorko anoncis, ke la rusa sopranulino ne plu aperos en la operejo dum la kuranta sezono aŭ la sekvanta. Komence ŝi tenis

sian starpunkton, ke ne pravas trudi al artistoj esprimi publike politikajn opiniojn kaj denunci sian patrujon, sed fine cedis al persista premo kaj neis proksimecon kun Putin, protestante, ke ŝi neniam estis subvenciata de la rusia registaro. Post ŝia deklaro ĉi-foje la Ŝtata Opera kaj Baleta Teatro en Novosibirsk, Rusio, senprokraste nuligis ŝian koncerton, dum *La Scala* kaj la Opero de Montekarlo male etendis manon al ŝi.

Makulo en la rusan muzikon

La milito en Ukrainio ne nur viktimitas rusajn muzikistojn, sed ankaŭ kompromitas la rusan muzikon mem. La Filharmonio Chubu kaj la Filharmonio Akashi, ambaŭ en Japanio, la Filharmonio Cardiff en Britio kaj la Zagreba

Filharmonio en Kroatio nuligis prezentadon de la uverturo 1812 de Ĉajkovskij, ĉar la muzikaĵo estas omaĝo al rusa venko en milito. La irlanda *Trinity Orchestra*, konsistanta el universitataj studentoj, retiris koncerton de *Cignolago* de la rusa komponisto, kvankam la artaĵo ne rilatas al milito.

Cetere la Monda Federacio de Internaciaj Muzikaj Konkursoj eksmembrigis la Internacian Konkurson Ĉajkovskij, deklarante ke la organizaĵo ne plu povas agnoski konkurson, kiu estas subtenata kaj ekspluatata kiel propagandilo de la rusia reĝimo. La konkurso estas rigardata kiel unu el la tri plej prestiĝaj klasikmuzikaj konkursoj kune kun la piano-konkurso Chopin de Pollando kaj la konkurso Reĝino Elizabeto de Belgio. Estas ironie, ke la

Ukraina Nacia Muzika Akademio en Kijivo portas la nomon de Ĉajkovskij, kies praavo estis ukraino. Post la komenco de la milito oni diskutis pri la forigo de la nomo de la rusa komponisto, tamen ĝis nun oni tion ne faris.

Kontraŭ bojkotoj

Dume unuflanke aŭdiĝas ankaŭ voĉoj, ke politiko ne miksiĝu kun arto. Kelly Jane Torrence, redaktorino de *New York Post*, kun peano por Gergijev kaj Netrebko alvokis retiri la interdikton al rusaj artistoj. Ŝi rimarkigis, ke eĉ ĉe la apogeo de la malvarma milito Rusio kaj Usono kunhavis la komunan lingvon de muziko, menciante, ke la usona pianisto Van Cliburn plenumis multon por arto kaj paco, kiam li gajnis la unuan premion en la inaŭ-

gura Internacia Konkurso Ĉajkovskij en Moskvo en 1958, kio estis ŝoko al la rusoj. Ŝi konkludis, ke arto estas ĉiam esenca al homa vivo, sed kultura interŝanĝo iĝas eĉ pli gravega en tempo de politika streĉiteco.

La fama brita publicisto Norman Lebrecht, konato de Gergijev dum tridek jaroj, kolektante personajn memorojn pri li, esprimis sian bedaŭron: „Mi diru, ke mi ne ŝatas bojkotojn. Interne de proskribita artisto ankoraŭ troviĝas persono kun unika talento, kiu tamen eble havas kapablon kompensi al si mem, kaj al sia aŭdantaro, per arto. Estis ĉiam io bona en la Valerij Gergijev, kiun mi konis. Mi esperas, ke li, kaj ni, povos retrovi tion.”

Probable oni ne povus trovi „ion bonan” de la rusa dirigento Valerij Gergijev dum pli aŭ malpli longa tempo. Plej lastatempe la Reĝa Muzika Akademio de Svedio senigis lin je lia membreco, kaj jarfine Gergijev nomumiĝis de la rusia registaro kiel „Persono de la Jaro”. La fendo pliprofundiĝas. ■

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

lkk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat, Trevor Steele, Ian Fantom ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp




CHO Sung Ho estas emerita profesoro pri biologio kaj aktivis en la movado interalie kiel ĉefredaktoro de *La Espero* el Koreio kaj kiel vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio.

Pupteatro beletra, unuvoĉa

Stanislavo **BELOV**

Mi legis diversajn Esperanto-verkojn. Iuj estis profesinivelaj (Spomenka Ŝtimec, Cezaro Rossetti), aliaj baraktis ĉe nivelo de facila unufoja legaĵo (István Nemere, Friedrich Wilhelm Ellersiek). Sed ĉi-foje mi povas imagi nek leganton, nek eldonanton de la verko, kiun mi tenas en la manoj.

Leteroj longaj, edifaj, tedaj

Kio ĝi estas? „Opuntioj” estas leter-romano – ĝenro populara en la 18a jarcento, kiam verkistoj uzis ĝin por pli detale esplori sentojn kaj pensojn de siaj herooj kaj samtempe prezenti proprajn ideojn, ofte en formo pli aŭ malpli edifa. La epoko de Klerismo entuziasmigis per pluraj malkovroj, ŝajnis ke la homo trovis vojon al feliĉo kaj prospero kaj necesas nur reagordi la mondon surbaze de racio kaj forlasi malnovajn superstiĉojn kiel religio kaj patriarkeca moralo.

La aŭtoro pruntis ne nur la formon, sed grandparte ankaŭ la tonon de tiu epoko. La verko komenciĝas laŭ tre naiva maniero – iu ulo pro-

menas tra Parizo, laŭdante ĝin per kliŝaj epitetoj, kaj subite aŭdas sonon de saksofono. Kion li faras? Kompreneble li tuj direktiĝas al la loĝejo, de kie fluas tiuj ĉi sonoj por trovi tie klasikan paron – maljunan blindulon kaj lian nepon-muzikiston.

Interŝanĝinte patosajn frazojn la novaj konatoj tuj amikiĝas, la nepo eligas koston kun malnovaj leteroj iam senditaj al la blindulo kaj laŭ lia peto komencas voĉlegi ilin al la nova amikaro. Tiu legado daŭras la tutan libron, nur foje interrompate per mallongaj rimarkoj de la ĉeestantoj.

Leteroj venas de malnovaj amikoj de la blindulo – lia kolemino Lola, ŝia edzo Ramon kaj kelkaj aliaj personoj. En ĉiu letero ili rakontas pri okazintaĵoj de sia insulo Bonveno, situanta ie inter Afriko kaj Eŭropo. La eventoj estas apenaŭ rimarkindaj, pli ĝuste – tipaj por etaj komunumoj, kiuj malmulte komuniĝas kun la ekstera mondo. La loka socio estas dividita en du partiojn kaj du paroĥajn grupojn, kiuj senĉese kverelas. Ramon kaj Lola krome kverelas ankaŭ kontraŭ Peppini kaj Nina, kun kiuj ili tamen finfine repaciĝas.

En lastaj paĝoj de la romano Nina eĉ venas al la Domo por Maljunuloj, establita de Ramon kaj proponas al ĝi ĉekon kun granda sumo, sed tuj falas trafite de nekonata pafanto. Fine ni vidas en la menciita domo marmorajn opuntiojn, kiuj memorigas al ni pri la vivaj opuntioj kuŝantaj en Parizo surtable antaŭ la blindulo, danke al kiu ni ekkonis tiun ĉi historion.

Pupteatro unuvoĉa

Mi ne estas fakulo pri literaturo, sed legis sufiĉe da beletraĵoj por ellabori guston pri bona literaturo. Ĉi-foje mia gusto protestas kaj rifuzas konsumi la proponitan pladon.

Mi ne povas diri, ke la frazoj estas kriplaj kaj la aŭtoro ne scias verki tekstojn – male, li sufiĉe bone scias triki longajn vortkombinojn, ne perdiĝas en parolturnoj kaj lerte plektas historiojn. La problemo estas ke, same kiel multaj amatoraj verkistoj, li malsukcesis krei vivan mondon enloĝatan de vivaj roluloj.

Tasko de verkisto estas krei universon, kiu vivos per propraj reguloj, kvazaŭ sen lia enmiksiĝo. Li devas esti kiel Zamenhof, kiu no-

mis sin ne kreinto, sed nura iniciatinto de Esperanto. Enspiru la vivon en viajn rolulojn kaj lasu ilin vivi memstare. Pri tio ĉi la aŭtoro komplete malsukcesis. Lia verko aspektas kiel pup-teatro, sur kies scenejo aperas kaj malaperas kartonaj pupoj. Ili svingas la manojn kaj piedojn kaj ion parolas, sed ni klare vidas la pupgvidiston, kiu kondukas ilin per la ŝnuroj kaj aŭdas lian voĉon, preskaŭ ne ŝanĝitan.

Por pli bone komprenigi tion mi prezentu kvar pecojn de la teksto, kiuj apartenas al kvar malsamaj personoj.

„Tie, en publika korto, aŭdiĝas saksofona sonado, kiu nepre atentigas vin por halti, por pli bone aŭdi de kie ĝi venas. Ŝajnas ke ĝia soniganto bone ĝin regas. Ne makabraĵo, kiun kelkfoje muzikistoj provas proponi, eble intence por nin ĝeni; male ĝi proponas vivantan sonadon, ĝojigantan kaj ridetigantan, atentante longe spirigi nin, samkiel io subite movas nin, aŭ samkiel, ni diru, oni troviĝas surmare, kaj sentas sin sufoki [tiele]”¹

1. La indikoj [tiele] estas indikoj de la redaktoro pri lingve dubindaj formoj.

per tiuj ondoj de freŝa kaj viviga aero.”

„Nu, mi parolas pri opuntioj. La festo de Sankta Laŭrenco estas la ĝusta tempo de opuntio-apero. Hodiaŭ ĉi tiuj sur la tablo malgrasiĝis, kiel mi. Ili kaj mi similas, ĉi tie, malproksime de mia patrolando. Sed por mi ili kunportas trafan signifon, pro siaj ekstero kaj interno. Ekstere ili estas malglataj, krudaj, sed interne ili estas tre bongustaj. Ne estimu ilin nur laŭ ilia sekeco sed imagu ilin freŝaj. Jen similaĵo: por atingi la kernon de io, oni devas suferi, subiĝante tion [tiele], kio vin atakus ĉiumomente.”

„Amiko, ĉi tie vi enkondukis nin en la regnon de filozofio. Ni alvenis por iom gustumi la dolĉecon de la saksofon-sonado, dum vi subite ŝanĝis la etoson, lulante nin en alian artisman paradizon. Jes ja, ĉio havas siajn belecon kaj malbelecon. La vivo formiĝas el du vizaĝoj kiel tiuj de simpla moneto. Ĉu ne, amiko?”

„Priparolante min, ĉu vi scias kie mi troviĝis antaŭ kelkaj tagoj? En boato iom malproksime de la bordo, mirigante la belecon [tiele] de la profunda silento, ĉirkaŭanta min, kiel ĉirkaŭvolvitajn bebon. Mi sentis min kaj duonfeliĉa kaj duonmalĝoja. Ĉar mi memoris pri unu el niaj renkontiĝoj.”

Ĉu vi rimarkis la diferencon? Mi ne sukcesis trovi ĝin. Ŝajnas, ke ĉion ĉi diras unu persono, eĉ voĉnuancoj ne diferencig-

ebblas. Tamen, se kredi al la romano, la unua fragmento estas voĉo de la aŭtoro, la dua apartenas al la maljuna blindulo, la tria al lia hazarda gasto kaj la kvara al la juna Lola. Mi certas, ke se oni hazarde intermiksus la heroojn kaj iliajn parolojn, neniun rimarkus tion. Fakte ni aŭdas nur unu voĉon – tiun de la aŭtoro. Ĝi povus esti saĝa, emociplena aŭ originala, tamen la kartona pupteatro anstataŭ la viva mondo ne estas tio kion oni atendas de romano, aperinta en la 21a jarcento.

Same artefarita aspektas enigo de Esperanto en la intrigon – unu el la plej ŝatataj trukoj de Esperanto-verkistoj. En p. 74 Lola sciigas, ke ŝi aliĝis al Esperanto-klubo kaj rakontas pri la Lingvo Internacia – per kliŝaj, banalaj frazoj: facileco, neŭtraleco ktp. Feliĉe poste Esperanto malaperas por reaperi nur en p. 205, kie la prezidanto de Bonveno kun miro vidas dulingvan ŝildon sur la Domo por Maljunuloj. Informite, ke la unua vorto estas en Esperanto, li mirinde sukcese legas „Ĉielarko”, plian fojon montrante, ke Esperanto estas tiom facila, ke oni povas legi ĝiajn vortojn eĉ sen koni specifajn literojn de la Esperanto-alfabeto.

En tiaj momentoj en la 18a jarcento kleraj sinjoroj, venintaj al publika legado, svingis la ĉapelon kaj sentimentalaj sinjorinoj viŝis la kortuŝajn larmojn. Mi povas nur levi la manojn.

Lingvaĵo perfektiginda

La lingvaĵo de la romano, tradukita de la aŭtoro el la malta lingvo, estas ... perfektiginda. Ofte sentebblas influo de la originala lingvo, pro kio aperas eraraj vortformoj kaj kriplaj frazoj. Mi donos nur kelkajn ekzemplojn:

„Li ridetas kun sia kva-zaŭjunula voĉo” (p. 12), „li portas blankecan haŭton” (12), „moneto” (13), „mi perdis mian vidon” (14), „post farmaciaĵalprenado kaj post operacio-subiĝo” (14), „Katald priatentas por ne subiĝi kion li ja subiĝis antaŭ kelkaj jaroj” (18), „ek-troa”, „mi ne dormis partoprenante longdaŭran nasko-sperton en hospitalo” (22), „Matilde estas pli liberala ol sia frato” (23), „ŝi povus elrigardi pli bela” (60), „membroliganto de Bonveno” (114), „ĝojoza marŝo” (128), „Omar de-mandis sian nepon Horace, se ili ambaŭ iam ricevis ion pri Lola” (131), „Italujo ... ekde longe ne subiĝis tian okazintaĵon” (135), „lia ringo glisis en sia mano” (154), „mi ellevis la dekstran brakon” (168).

La aŭtoro jen forgesas akuzativon, jen metas ĝin

nenece. Li ofte konfuzas *li* kaj *ŝi*. Fojfoje li uzas *li/ŝi* anstataŭ *ĝi* – ekzemple rilate eklezion (24). Evidente sub influo de sia denaska lingvo, li majuskligas plurajn vortojn, kiuj certe ne bezonas tion – Opero, Profesoro, Psikologio, Rektoro, Fenomenologio. Unuvorte, la teksto bezonas seriozan lingvan poluradon kaj povas servi kiel ekzemplo de tio, kio okazas, kiam oni neglektas provlegadon.

La eldonaĵo mem estas bona. Blanka papero, ĉarma kovrilo, simpla sed nemalbona tiparo, kovrilo mola sed la paĝoj bone intergluitaj. Tajperaroj ne multas, kvankam la unua renkonteblas jam en p. 5 – en enkonduko de la aŭtoro aperas „Esper-anto”. Enpaĝigo kelkfoje lamas kaj alineoj transsaltas malregule, sed tio maloftas kaj ne tro ĝenas.

Resume mi povas diri, ke tiu ĉi libro evidente eniros la historion de Esperanto-literaturo kaj estos menciata en venontaj rilataj studaĵoj, sed nur danke al tio, ke temas pri malofta (unika?) speco de Esperanto-beletraĵo kreita en Malto. Aliajn kialojn mi ne povas imagi. ■



Carmel Mallia: *Opuntioj*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2021. 272 paĝoj, bindita kaj bita.

Prezo ĉe FEL: presita versio: 16 eŭroj plus afranko, bitaj versioj: 9,60 eŭroj.

Por ekzameniĝi sen problemoj

Renato **CORSETTI**

Antaŭ ol paroli pri la libro, mi devas paroli pri mi, ĉar mi estis ĉe la komenco de la KER-ekzamenoj en Esperanto, estisekzamena ĝis C1, ekzamenis dum multaj jaroj en multaj okazoj kaj niveloj, kaj nun gvidas kursojn, kiuj promesas al la kursanoj pretigi ilin por la B2-ekzameno, sed mi ne havis klaran bildon antaŭ ol legi ĉi tiun libron, pri ĉio, kion oni devas scii por alfronti la ekzamenon sen problemoj.

Certe ni ĉiuj scias, laŭ la memtaksilo pretigita de www.edukado.net (sed en ĉi tiu recenzo mi uzas pronomojn laŭ mia maniero), ke la kandidato devas kapabli kompreni iom longajn paroladojn kaj prelegojn, kaj sekvi eĉ kompleksan argumentadon, se la temo estas sufiĉe konata, kaj ĝi [= li aŭ ŝi] kapablu kompreni plej multajn televidprogramojn pri novaĵoj kaj aktualaĵoj. Kaj pri parolado ĝi kapablu klare kaj kun sufiĉaj detaloj esprimi sin pri pluraj temoj rilataj al sia propra intereskampo, kaj esprimi sian opinion pri aktuala temo, detalante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la diversaj ebloj.

Paroli Esperanton bone

Praktike la kandidato devas paroli Esperanton bone, kvankam la temoj ne estos teĥnikaj, sed la aŭskultotaj tekstoj aŭ la petotaj konversacioj temos pri novaĵoj kaj aktualaĵoj. Do necesas pretigi sin paroli pri pluraj eblaj aferoj.

La recenzata libro elektis 15 temojn. La unuaj 4 temoj (Personaj kaj familiaj indikoj, Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo, Laboro kaj ĉiutagaj farenadoj, Lernado) ebligas al la kandidato senprobleme konversacii dum la komencaj ĝentilecaj demandoj, kiuj estas kutimaj ankaŭ en la nivelo B2, pri la persono kaj liaj aŭ ŝiaj vivo, loĝloko, okupoj. Sed atentu, kandidatoj: la demandoj estas tre ĝentilaj, sed la instruista menso de la ekzamenantoj ne estas tiom impresata de la fakto, ke vi konstruas atom-bombojn, kiom de la manko de akuzativo en via diro: „Cetere mi ricevis la premio Nobel”.

Sed jam de la 5a temo (Komunikado) la horizonto komencas vastiĝi al la socio, al la komputilaj retoj kaj al amaskomunikiloj. Kaj simile en la sekvaj temoj (rilatoj kun aliaj homoj – privata kaj publika vivo, libertempo – amuziĝo – kulturo, sano –

sporto), kies lernado ebligas kompreni kaj diskuti pri la proponotaj tekstoj por aŭdkomprenaj ekzercoj, kiuj ofte traktas nuntempajn ĝeneralajn temojn.

La sekvaj kvar (aĉetado kaj servoj, manĝado, trafiko, vojaĝo) estos tre utilaj por kunludi en la ekzamenaj rol-ludoj, en kiuj ofte oni devas ludi la rolon de kliento, kiu protestas ĉe vojaĝagentejo aŭ simila oficejo pri la malbona kvalito de la ricevitaj servoj.

Sekvas fine ankoraŭ tri temoj (nia medio – la naturo, la lando de la ekzamenato, Esperanto-kulturo), el kiuj nur la lasta eble ne estas necesa por la KER-ekzamenoj, kiuj rilatas nur al la fluco de parolado sen aparta atento al la kulturo de la Esperanto-komunumo.

Ĉu tro kompleta?

Ĝis nun mi prezentis nur la strukturon de la libro, sed la vera riĉaĵo de ĝi

estas en la traktado de ĉiu unuopa temo, kiu konsistas el kvar aŭ kvin paĝoj, en kiuj la temo estas prezentata per teksto rekte uzebla en la ekzamenaj konversacioj, el unupaĝa listo de atendeblaj demandoj, kaj el listo de vortoj bezonataj por paroli pri la temo, kiuj por la unua temo estas 230, por doni al vi ideon pri la kompleteco de ĉi tiuj terminaretoj.

Sed la rakonto ankoraŭ ne finiĝis, ĉar, se vi aĉetos la libron, vi havos aliron al retaj materialoj en la paĝo www.lingve.eu/eo/libro-pri-kio-temas/, per kiuj vi povos ekzerciĝi pri aŭdkomprenaj taskoj, ricevi la tradukon al via lingvo de la vortoj lernendaj ktp.

Ĉu io malfavora pri ĉi tiu libro? Mi ne povas trovi ion klare kritikindan. Eble ĝi estas tro kompleta, kaj se mi prezentus ĝin al miaj aziaj retaj lernantoj, ili ektimus pro la kvanto da vortoj, kiujn ili devos lerni. ■



Szabolcs Szilva: *Pri kio temas? Ellaborado de la 15 temoj de la B2-nivela KER-ekzameno.*
Eld. Lingve, Varsovio, 2020. 175 paĝoj.
ISBN 978-83-957710-0-2.

Tragedia rakonto

Anna LÖWENSTEIN

Danke al filmoj, ni ĉiuj konas la rakonton pri Frankenŝtajno¹. Se oni legas la originalan romanon, oni malkovras, ke oni ne konas la rakonton tiel bone, kiel oni supozis. Ĝi ne estas horror-rakonto, sed fakte tre morala kaj tragedia. Finfine oni kompatis la monstren, malgraŭ liaj teruraj krimoj, kaj ne abomenas, sed almenaŭ komprenas lin.

Frankenŝtajno ne estas la nomo de la monstro, sed de la homo, kiu kreis lin, Viktor Frankenŝtajno. La monstro fakte neniam ricevas de sia kreinto nomon, kaj dum la daŭro de la romano li nomiĝas nur „la monstro”, „la demono” kaj simile. Tio estas signifa, ĉar kreinte vivantan, pensokapablan estulon, Frankenŝtajno neniam traktas ĝin per la zorgoj, kiujn patro normale ŝuldas al sia filo: li donas al ĝi nek nomon, nek prizorgadon kaj manĝojn, nek lingvon.

La monstro estas sufiĉe sentema kaj tre konscia pri

sia izoliĝo. Same kiel ĉiuj, li deziras rilati kun aliaj homoj, sed lia aspekto estas tiel horora, ke, kiam li alproksimiĝas al homoj, ili tuj fuĝas terurite, aŭ minacas kaj atakas lin. Li mem lernas paroli kaj legi, kaŝe observante dum monatoj familion tra truo en la muro de ĝia domo. Tre oportune, dum tiu periodo la familianoj instruas sian lingvon al „dolĉa arabino”, al kiu necesas instrui ankaŭ la latinan alfabeton, kaj sen ilia scio ankaŭ la kaŝiganta monstro profitas de iliaj instruoj. Eĉ pli oportune,

li malkovras valizon en la arbaro, en kiu estas pluraj libroj; mirige tiuj libroj konsistas el *Perdita paradizo*, biografioj de Plutarĥo, kaj tiu ikono de la romantikismo *La suferoj de la juna Werther*.

La monstro edukas sin mem

Tiel la monstro edukas sin mem kaj lernas prezenti sian situacion per eksterordinara elokventeco, kun aludoj al la klasika kaj romantika tradicioj. Bedaŭrinde,

ĉar tiurilate la moderna leganto estas verŝajne malpli klera ol li, mankas en ĉi tiu eldono notoj, kiuj utilis por klarigi la malpli konatajn aludojn: interalie kial la subtitolo de la verko estas *La moderna Prometeo*. (Prometeo estis figuro el la greka mitologio,

kiu ŝtelis fajron de la dioj kaj donacis ĝin al la homaro. Sekve la dioj punis lin pro lia krimo. Simile, Frankenŝtajno strebas al nepermesataj scioj, kiujn li mem ne kapablas regi.)

”
La romano furoris ekde sia unua apero en 1818, ne nepre ĉe la recenzistoj, sed certe ĉe la publiko. Ĝi enhavis ideon, kiu al ni nun estas preskaŭ banala, sed tiam estis elstare originala

Nuntempe ni atendas, ke romano kaptu nian atenton ekde la unua paĝo, sed en la frua 19a jarcento legantoj havis pli da pacienco. Ne miru, ke la rakonto komenciĝas per tute senrilata rolulo, kiu sendas leterojn al sia fratino pri siaj planoj ŝipvojaĝi al la Norda Poluso. Nur en la kvara letero finfine la intrigo komencas moviĝeti. Iom post iom ĝi rapidiĝas, kaj la emocioj pli kaj pli streĉiĝas ĝis la fino.

La unua sciencfikcia romano

La romano furoris ekde sia unua apero en 1818, ne nepre ĉe la recenzistoj, sed certe ĉe la publiko. Ĝi enhavis ideon, kiu al ni nun estas preskaŭ banala, sed tiam estis elstare originala; efektive tiu romano verkita de 18-jara junulino, Mary Shelley, enhavis unikan, eksterordinaran koncepton. Oni nun konsideras ĝin la unua sciencfikcia romano.

Mary Shelley (1797–1851) estis la filino de du grandaj intelektuloj, la radikala filozofo William Godwin, kaj la verkistino Mary Wollstonecraft, kiu pledis por la rajtoj de virinoj. Bedaŭrinde ŝi mortis dek tagojn post la nasko

1. Tiun formon uzas la aŭtoro de la recenzita verko. En Vikipedio estas la pli kutima *Frankenŝtejno* (red.).

de sia filino. Dek ses jarojn poste tiu filino enamigis kun la poeto Percy Bysshe Shelley, kaj, ĉar li jam estis edzo, ili fuĝis kune al la eŭropa kontinento. Ili pasigis la someron de 1816 apud la lago Ĝenevo, en ofta kontakto kun la poeto Byron, kiu same troviĝis tie. Ilia amiko Byron proponis, ke ĉiu el ili verku fantomrakonton (ankaŭ la kuracisto de Byron partoprenis en la konkurso), sed el la kvar nur Mary efektive verkis kaj finis sian rakonton.

Jam fine de la 18a jarcento, la itala fizikisto Luigi Galvani malkovris, ke eblas movi la muskolojn de mortinta rano per elektra kurento, kaj en 1803 lia nevo faris publikan eksperimenton, en kiu li fluigis elektron tra la kadavro de ekzekutita krimulo, kiu efektive movis siajn membrojn kaj eĉ malfermis unu okulon. Mary certe sciis pri tiaj eksperimentoj, kaj fakte ŝi mencias „galvanismon” en la reviziita eldono de sia romano de 1831. (Ĉi tiu esperanta traduko tamen sekvas la unuan eldonon de 1818, en

kiu la vorto „galvanismo” ne aperas. La tradukinto, Klivo London, klarigas en noto ĉe la komenco, ke laŭ iuj kritikistoj la unua eldono estas pli trafa.)

Freneza sciencisto

Eĉ se ni neniam vidis la faman filmon el 1931 kun Boris Karloff, ni ĉiuj scias pri tiu drama sceno, en kiu la obsedita d-ro Frankenŝtajno (ĉu Mary Shelley inventis ankaŭ la koncepton de la freneza sciencisto?) vivigas sian kunflikitan estaĵon per fulmo. Kaj tamen en la romano la maniero, en kiu Frankenŝtajno vivigas sian monstron, estas nur flanke aludita. Ŝajne temis pri elektro aŭ „galvanismo”, sed tio ne estas klare montrita.

Tiu romano restas interesa ankoraŭ nuntempe. Ĝi prezentas la figuron de sciencisto, kiu obsediĝas pro sia esplorado, tute ne zorgante pri ĝiaj eventualaj sekvoj, precipe kiam tiuj tuŝas moralajn demandojn. Eble ni ne interpretas ĝin precize same kiel la unuaj legantoj, sed ni trovas en ĝi pripensindan mesaĝon ankaŭ rilate al la moderna mondo. ■



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL




Mary Shelley: *Frankenŝtajno aŭ la moderna Prometeo*. El la angla tradukis Klivo London. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2022. 186 paĝoj. Glubindita. ISBN 978-9077-06675-1. Ankaŭ bitlibro.

Lange Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio.
tlf. + 32 3 234 34 00
rete: retbutiko@retbutiko.be
skajpe fel-monato
www.retbutiko.be

Mary Shelley

Frankenŝtajno aŭ la moderna Prometeo



Kiu ne konas Frankenŝtajnon? Aŭ pli precize, la monstron kiun li kreis? Sed, ĉu vere ĝi estis monstro?

Frankenŝtajno estas klasikaĵo de la angla literaturo, kiu kunigas la ĝenrojn de gotikismo kaj romantikismo. La verkinto, Mary Shelley, filino de filozofoj, estis nur 18-jaraĝa kiam ŝi verkis la romanon.

Viktor Frankenŝtajn estas junulo el Ĝenevo. Dum siaj studoj ĉe la Universitato de Ingolstadt en Bavario, li malkovras “la kaŭzon de generiĝo kaj vivo”. “Ne, pli ol tio! Mi eĉ fariĝis kapabla enanimigi senvivan materion.”

Nerezistebla impulso pelas lin konstrui homan korpon, per korpopartoj de kadavroj, kaj viviĝi ĝin. Bedaŭrinde, li sukcesas.

La ĵus vivigita estulo, konfuzite, forfuĝas. Li scias nenion, kaj devas mem lerni ĉion de nulo. Komence, li deziras esti akceptata de la homoj, sed pro sia horore malbela vizaĝo, li estas kruele forpelita de ĉiuj. En mizero, li serĉas sian kreinton, kaj minacas lin per murda venĝo.

Eldonjaro: 2022. Presita versio: 186 p., 14 € + afranko.

Bitaj versioj (ePub, PDF, Kindle): 8,40 €.

Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, 2060 Antwerpen.

www.retbutiko.be / retbutiko@fel.esperanto.be

